




La Opia Milito

FREMDLINGVA ELDONEJO
PEKINO

La Opia Milito

De la Kompila Grupo
por la Broŝuroj pri
“Ĉina Moderna Historio”



FREMDLINGVA ELDONEJO
PEKINO

Vortoj de Eldoninto

La Opia Milito estas unu el pluraj broŝuroj pri la ĉina moderna historio eldonitaj de la Ŝanhaja Popola Eldonejo. Aliaj estas: *La Revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno*, *la Reforma Movado de 1898*, *Jihetuan-movado* kaj *La Revolucio de 1911*. Tiuj libroj estas kompilitaj de membroj de la fakultatoj pri historio de Fudan-a Universitato kaj Ŝanhaja Pedagogia Universitato. Ni faris malmultajn ŝanĝojn en la traduko.

Unua Eldono 1978

Presita en Ĉina Popola Respubliko

Enhavo

1. La Avaraj Britaj Invadantoj	1
2. La Hontinda Opia Komerco	8
3. La Debato pri la Opia Malpermeso	19
4. Britaj Agresantoj Alkondukis Militon al Ĉinio	34
5. Sanjuanli-a Popolo Bategis la Invadantojn	50
6. Ekspansio de la Milito	61
7. Popolaj Kontraŭbritaj Bataloj en Fugian, Ĝegiang kaj Malsupra Jangzi-valo	75
8. La Nankina Traktato	81
9. La Usonaj kaj Francaj Invadantoj Fiŝis en Malklara Akvo	91
10. Naskiĝo de Duonkolonia kaj Duonfeŭda Socio	102

La Opia Milito de 1840 — 1842, en kiu la ĉina popolo batalis kontraŭ brita agreso, markis kaj la komencon de moderna ĉina historio kaj la starton de la burĝ-demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo fare de la ĉina popolo.

Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo, en la artikolo “La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio” skribita en 1939 montris: **“La procezo de transformado de Ĉinio en duonkolonion kaj kolonion fare de imperiismo en kunligo kun ĉina feŭdismo estas ankaŭ tiu de la batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La Opia Milito, la Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno, la Ĉina-Franca Milito, la Ĉina-Japana Milito, la Reforma Movado de 1898, Jihetuan-movado, la Re-**

volucio de 1911, la Movado de 4-a de Majo, la Movado de 30-a de Majo, la Norden-Ekspedicio, la Milito de la Agrara Revolucio kaj la nuna Kontraŭjapana Rezistmilito, ĉiuj manifestas la obstinan rezistemon de la ĉina popolo, kiu neniam volas submetiĝi al imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.”

La Opia Milito estis intence provokita de la britaj invadantoj. Ĝi estis la unua el serio da agresaj militoj lanĉitaj de la kapitalismaj potencoj por turni Ĉinion en sian duonkolonion kaj kolonion.

En duonjarcento antaŭ la milito, King-dinastio tiam reganta super la ĉina popolo estis jam tute putra. Ĝiaj politika marasmo, milita senpoveco kaj financa nesolventeco fariĝis evidentaj. Socia riĉaĵo iom post iom estis koncentrita en la manoj de malmultaj ekspluatantoj — nobeloj, oficistoj, bienuloj kaj egkomercistoj. La problemo pri tera anekso fariĝis pli kaj pli serioza. Kampanoj kaj metiistoj suferis ekspluaton pro kontinue plialtiĝantaj impostoj, terrento kaj uzuro, kaj klasaj kontraŭdiroj intensiĝis. Popolaj sekretaj societoj fariĝis pli aktivaj en siaj bataloj kontraŭ reakcia regado de King-dinastio. La Blanka Lotuso, kampana leviĝo, kiu daŭris naŭ jarojn kaj etendiĝis tra pluraj provincoj en la fino de la 18-a jarcento ĝis la komenco de la 19-a jarcento, estis eksplodo de tiuj kreskantaj klasaj kontraŭdiroj. Kvankam la leviĝo estis kruele subpremita de la re-

gantoj de King-dinastio, tamen ĝi peze batis kaj sufiĉe malfortigis la regadon de King-dinastio. Popola rezisto daŭris senĉese en la sekvantaj jaroj. La reakcia regado de King-dinastio komencis ŝanceliĝi.


Dume, kapitalismo disvolviĝis rapide en Eŭropo kaj Ameriko. En Britio, la unua kapitalisma potenco de la mondo, metiaj industrioj iom post iom cedis lokon al maŝina industrio en la lasta duono de la 18-a jarcento. En la komenco de la 19-a jarcento, kapitalismo pli rapide disvolviĝis tie. En 1825, la unua krizo de superprodukto en la kapitalisma historio okazis en Britio. La brita burĝaro urĝe bezonis serĉi novajn kaj grandajn merkatojn por vendi siajn varojn kaj por forskui la krizon kaj gajni pli da profito. Fortigante sian kontrolon super la hindan kolonion, ili direktis la agresan lancpinton al Ĉinio, lando kun vasta teritorio, riĉaj materiaj fontoj kaj grandnombra loĝantaro, por perforte malfermi ĝian pordon kaj etendi siajn tentaklojn por rabi kaj sklavigi la ĉinan popolon.

Tiam, kiel la tuto en la ĉina socia ekonomio estis natura ekonomio kombinanta individuan farmon kun metioj. La familio estis la baza unuo de kamparana produkto, la viro kulturis la teron kaj la virino teksis ŝtofon. La plejmulto de vestoj kaj aliaj ĉiutagaj necesajoj de la kamparanoj estis produktita hejme. Ili ne havis urĝan bezonon, nek la monon por

aĉeti la fabrikitajn varojn de fremda kapitalismo. Por pagi troegajn terrentojn kaj multspecajn impostojn, de tempo al tempo ili devis vendi iom da siaj flankokupaj produktaĵoj. Tial, estis malfacile ŝuti britajn varojn en la ĉina merkato.


Dum 43 jaroj, de 1786 ĝis 1829, britaj kapitalistoj okfoje venis al Ĉinio por vendi kotonajn teksaĵojn. Sed, tiuj kotonaj teksaĵoj havis malbonan vendadon kaj ofte perdis profiton. Ekzemple, en 1790, Britio akiris nur 2,000 *liang*-ojn (mezurunuo de pezo, uzata en Ĉinio kaj egalvalora al $1\frac{1}{3}$ uncoj) da arĝento por la 100 pecoj da kotonaj ŝtofoj de Manĉestro, kiuj apenaŭ kovris kostojn. Plue, en 1821, la 4,509 pecoj da britaj kalikotoj kaj 416 pecoj da kotonveluroj kaj silkveluroj, kiuj estis venditaj per aŭkcio en Kanton, kolektis nur 40 procentojn de kostprezoj. Tiaj perdoj daŭris ĝis 1827, tiam kvankam britaj varoj estis profitdonaj, tamen la merkato por ili estis ankoraŭ limigita.


Manko de merkato en Ĉinio por britaj industriaj varoj igis Ĉinion konservadi favoran saldon en sia komerco kun Britio. Ĉe la fino de la 18-a jarcento, la Orienta Hinda Kompanio (kiu sub ĉarto de la brita registaro monopoligis komercon kun la Oriento, ĉefe kun Hindio kaj Ĉinio, kaj okupiĝis je koloniaj entreprenoj tie de la 17-a jarcento ĝis la mezo de la 19-a) aĉetis teon en la meznombro de 4 milionoj da




La Huangpu-a komerchaveno apud Kantono en 1835.

La kontrabandaj ŝipoj de opio ankritaj ĉe Lingding-marŝo de Guangdong-provinco en 1839.






La interbatalo de la maristoj de King-dinastio kun britaj militŝipoj sur maro ĉe Kantono en la 7-a de januaro 1841.



La malnova sidejo de Humen-a Fortikajo de Kantono.



Kanono de Humen-a Fortikajo de Kantono.



La antikva templo en Sanjuanli ĉe Kantono, kie
vilaĝanoj rezistis la britan invadon en 1841.

三元里、西村、南岸、九十餘鄉、衆矜者、為不共戴天、誓為
英逆事、照得向來英逆、素不安分、屢犯

大朝、昔攻沙角炮台、戕害官兵、或

至上海、惡加誅、且示懷柔、彼尚不知感、思猶復包藏禍心、

深入重地、亂施火箭、燒害居民、攻及城池、目無名憲、

致差大臣、見城廂內外遭殃、議約戢兵安民、英逆理宜得此、

好意即休、胡乃貪勝不知輸、得尺則尺、得寸則寸、容縱


兵卒、擾亂村庄、搶我耕牛、傷我田禾、鋤壞我祖墳、淫辱

我婦女、鬼神共怒、天地難容、我等所以奮不顧身、圖國
義、律於北門、斬首百、懸於南岸、爾等逆黨、試思此時、
若非我、府尊為爾解此厄、各逆其得保首領以下婦孺、
今爾亦出亦當途、辱為將軍大人無功、揚言於衆、與
百、中堂、其早視我此地無人實甚、我等固是氣憤成、
雲、志除妖孽、飽德之義士、奮助兵機、衝之震天、整
利、及、務使鬼子無影留存、鬼族無片耽、回國而後已、亦
列、亦其、日、交戰、為此、書、示、

Defio de la Sanjuanli-a popolo kontraŭ la britoj.

Uniformoj, glavo kaj sigeliloj de
la britaj invadantoj kaptitaj de la
Sanjuanli-a popolo de Kantono.

La britaj invadantoj rabas la
havajon de la ĉina popolo.





Sengping-eduksocieto — la kontraŭbrita gvida organo
organizita de la popolo de Sanjuanli-a areo de Kantono.

liang-oj el Ĉinio ĉiujare. Nur tio ĉi jam kompensis la tri ĉefajn komercaĵojn (lanan ŝtofon, metalan produktaĵon kaj kotonon) eksportitajn de britaj komercistoj al Ĉinio. La valoro de ĉiuj britaj varoj importitaj en Ĉinion de 1781 ĝis 1793, inkluzive lanan ŝtofon, kotonan ŝtofon, kotonan fadenon kaj metalan produktaĵon, egalis nur 16,870,000 arĝentajn dolarojn aŭ sesonon de la valoro de la teo eksportita de Ĉinio al Britio. Tial, por akiri silkon kaj teon de Ĉinio, la kapitalistoj en Eŭropo kaj Ameriko devis pagi grandan sumon da arĝento. En la komenco de la 19-a jarcento, ĉirkaŭ 1 — 4 milionoj da *liang*-oj da arĝento fluis en Ĉinion tra Kantono ĉiujare. Veninte al Guangdong-provinco, fremdaj komercistoj alportis arĝentajn dolarojn pli multe ol varojn.

Tiu ĉi favora stato de Ĉinio ĉagrenis la britajn kapitalistojn, kiuj avide penis por pligrandigi la merkaton por la produktaĵoj de siaj maŝinaj industrioj. Ili rigardis la limigitajn vendojn de siaj varoj kiel la rezulton de la pordfermita politiko praktikata de King-registaro. Ĉar antaŭ la Opia Milito nur unu ĉina haveno, Kantono, estis destinita por fremda komerco, kaj ĉiuj importaj kaj eksportaj aferoj estis farataj de la komercistoj kun speciala registara permeso. Deziro trovi sian vojon en Ĉinion, Britio provis per ĉiuj rimedoj persvadi King-registaron mal-

fermi pli multe da havenoj kaj permesi liberan komercon.

En 1793, la brita registaro sendis Lordon Macartney al Pekino kiel la ĉefon de granda delegacio por trakti kun King-registaro. Li postulis, ke la lasta malfermu ankaŭ Tiangin, Ĝouŝan kaj Ningbo kiel komercajn havenojn krom Kantono, koncesiu insuleton apud Dinghaj, reduktu tarifojn kaj permesu la propagandon de kristanismo en Ĉinio. Evidente, tiuj postuloj kun agresa naturo serioze atencis ĉinan suverenecon, tial ili estis rifuzitaj de King-registaro.

En 1816, la brita registaro sendis Lordon Amherst al Ĉinio, kaj li denove prezentis la antaŭajn agresajn postulojn elmetitajn de Macartney, kiuj refoje estis rifuzitaj.

En la dudekaj-tridekaj jaroj de la 19-a jarcento, kun la plua disvolviĝo de kapitalismo, la agresemaj britaj kapitalistoj fariĝis eĉ pli deziregaj por perforte malfermi ĉinan pordon por vendi siajn varojn. Ili kriis, ke, se la ĉina merkato estus malfermita, la vendkvanto de la britaj varoj tie superus tiun tutan en la aliaj merkatoj de la mondo. Tio plene malkaŝis la avarecon de la brita burĝaro al Ĉinio. Eksplikante la karakterizaĵojn de kapitalismo, Lenin montris, ke **“la kapitalisma sistemo ne povas ekzisti kaj disvolviĝi sen konstante etendi sian sferon de superrego, sen kolonii novajn landojn kaj sen tiri antikvajn,**

nekapitalismajn landojn en la akvokirlon de monda ekonomio".* Evidente, la lanĉado de la Opia Milito kontraŭ Ĉinio fare de britaj kapitalistoj ne estis hazarda okazaĵo.

* V. I. Lenin, "La Disvolviĝo de Kapitalismo en Rusio", *Elektitaj Verkoj*, Vol. III.

La britaj kapitalistoj provis per ĉiuj eblaj rimedoj ŝanĝi sian malfavoran saldon de komerco kun Ĉinio. En la lasta periodo de la 18-a jarcento, ili trovis, ke opio estis treege profitdona komercaĵo kaj havis grandan debiton en Ĉinio inter malŝparaj, malplenkapaj aristokratoj, burokratoj, bienuloj kaj riĉaj komercistoj. Ili decidis uzi ĝin por "frapi je la pordo".

Opio estis unue produktita en Hindio kaj Malgrandazio. Antaŭ 1767, opio importita de Hindio al Ĉinio ne superis 200 kestojn jare. King-registaro permesis importi opion kiel medicinajn ingrediencojn. En 1773, la registaro de la brita Hindio adoptis la kriman politikon grandkvante eksporti opion al Ĉinio kaj donis al la Orienta Hinda Kompanio la rajton

monopoligi la opian komercon en Hindio. Por garantii la efektivigon de tiu politiko, en 1797, ĝi donis al la kompanio ankaŭ la privilegion fabrikii opion. En la jaro 1800, opio eksportita al Ĉinio jam atingis 2,000 kestojn.

Akirinte la monopolon de la vendado kaj fabrikado de opio, la Orienta Hinda Kompanio faris ĉiujn penojn por pliigi opian produkton kaj eksporton. Ĝi devigis la hindajn kamparanojn kulturi opion kaj konstrui fabrikojn en Kalkuto por grandkvante prilabori opiajn miksturojn laŭ la gustoj de ĉinaj opifumantoj. Pere de la oficistoj de la registaro de la brita Hindio, la kompanio malkaŝe vendis la narkotaĵon per aŭkcio al komercistoj, kiuj poste kontrabandis ĝin al Ĉinio.

Opia komerco portis grandegajn profitojn al la Orienta Hinda Kompanio, la registaro de la brita Hindio kaj la opiaj vendistoj. Unue, prenu la Orientan Hindan Kompanion en la jaro 1813 kiel ekzemplon. La kosto de kesto da altgrada opio en Hindio estis 237 rupioj, sed ĝia prezo je aŭkcio, inkluzive la imposton kolektitan de la registaro de la brita Hindio, estis 2,428 rupioj, aŭ 9 obloj de la kosto. Antaŭ la grandkvanta importado de opio en Ĉinion, la kompanio elspezis grandsumon da arĝentaj dolaroj ĉiujare por aĉeti ĉinajn teon kaj silkon. Sed, post kiam ĝi akiris la monopolon de fabrikado kaj vendado de opio en

Hindio, la enspezoj de eksportoj al Ĉinio povis kovri elspezon por aĉeti grandnombron da ĉinaj teo kaj silko.

La kolonia registaro de la brita Hindio multe profitis de opia imposto, kiu fariĝis pli granda sumo en ĝia enspezo, la proporcio de imposto estis pli ol 300 procentoj laŭvalore. Tia imposto kolektita en 1829 — 1830 superis milionon da pundoj kaj okupis ĉirkaŭ dekonon de ĝia totala jara enspezo.

Por la opiaj vendistoj, la komerco estis fabele profitdona. Antaŭ la Opia Milito opia kontrabando estis pli riĉiga ol laŭleĝa komerco kun Ĉinio. Unue, oni ne pagis imposton, due, la ĉinaj komercistoj ĉiam kvitiĝis anticipe. William Jardine, la plej granda el la britaj opiaj komercistoj, malkaŝis en privata letero, ke “en la bonaj jaroj . . . malneta profito kelkfoje estis tiel alta, eĉ po 1,000 dolaroj por kesto.” Multaj el la komercistoj amasigis grandajn riĉaĵojn tra la krima komerco. Iuj akiris sian lokon en parlamento, kaj aliaj estis kavalirigitaj. Jardine mem havis grandan riĉaĵon kaj laboris en Ĉambro de Deputitoj kun nenia malfacilo en 1841. Alia opia kontrabandisto James Matheson, kiu revenis al Britio el Ĉinio en 1841, faris grandan komercon, kvankam neniu sciis ĝuste kiom da mono li havis, tamen estis konate, ke en la sekvanta jaro post la reveno, li aĉetis insuleton ĉe la okcidenta marbordo de Skotlando kaj elspezis

329,000 pundojn sole por ekspluati ĝin. Kaj tiu opia komercisto poste fariĝis kavaliro de Reĝino Victoria.

Opia komerco donis grandajn profitojn ankaŭ al la brita registaro kaj la britaj kapitalistoj havantaj komercajn rilatojn kun la Oriento. La imposto de importita teo estis grava sumo en la brita registara enspezo. En 1793, la valoro de ĉina teo eksportita al Britio sumiĝis je 16 milionoj da pundoj. En la tridekaj jaroj de la 19-a jarcento, ĝi superis 30 milionojn da pundoj. Tiel, la imposto kolektita de la brita registaro super teo saltis de 600,000 pundoj en 1793 ĝis 3,300,000 en 1833. Kaj la importo de teo el Ĉinio al Britio grandparte estis financita per la enspezo de opia kontrabando. La ĉefa merkato de la britaj kapitalistoj tiam komercantaj ĉe la Oriento estis Hindio. Dum la 21 jaroj, de 1814 ĝis 1835, brita kotonteksaĵo eksportita al Hindio kreskis de malpli ol 1 miliono da jardoj ĝis 51 milionoj da jardoj. Tiu ĉi enfluo de britaj maŝinfaritaj kotonaj ŝtofoj grandege difektis la hindan metian teksan industrion. En sia raporto por 1834 — 1835, la brita generalgubernatoro de Hindio konfesis, ke la skeletoj de la hindaj teksaj laboristoj blankigis la hindan ebenaĵon. La ĉiam grandiganta debito de britaj teksaĵoj en Hindio ĉefe estis kaŭzita de la fakto, ke la hindaj kamparanoj aĉetis ilin per sia enspezo akirita en la deviga opikulturo.

Do, estas klare, ke tiu krimea negoco estis strikte kunigita kun la interesoj de la brita registaro kaj la tuta brita burĝaro, kaj tio ja estas la kaŭzo, kial ili kun ĉiuj penoj persistis en daŭrigo de tiu negoco.

Ĉe la komenco de la 19-a jarcento, la britaj eksportoj de opio al Ĉinio kreskis rapide. La kontrabandistoj unue elŝarĝis sian opion el ŝipo en Aŭmen, kie la narkotaĵo estis vendita kaŝite, kaj poste veturis al Huangpu apud Kantono por vendi aliajn varojn publike. Sed poste, koruptite de la kontrabandistoj, la oficistoj de King-registaro fermis la okulojn kontraŭ la opia kontrabando, sekve la komercistoj konstante ankris surterigajn ŝipojn ĉe Huangpu kaj malkaŝe konservis kaj vendis la narkotaĵon tie.

Kun kresko de opia importado, King-registaro donis ordonojn malpermesi ĝin en 1796, 1800, 1813 kaj 1815, sed tio tute ne efikis.

En 1821, kiam King-registaro alprenis striktajn malpermesajn leĝojn, la komercistoj formovis la opiajn ŝipojn el Huangpu al la maro proksima al Lingding-insulo ĉe la buŝo de la Perla Rivero. De tiam, senbrida kontrabando daŭris en ĉiam pli granda skalo. Surterigaj ŝipoj konstante ankritaj ĉe Lingding plimultiĝis de 7 — 8 ĝis pli ol 20, kaj la kestnombro de opio konservita tie kreskis de kelke da miloj ĝis 20 — 30 miloj.

Aldone al tiuj surterigaj ŝipoj, kiuj servis kiel bazo por la opia komerco, kontrabanda reto estis formita tra ĉinaj marbordaj provincoj kaj interna lando, kaj eĉ la "elirejoj" de la opia komerco estis preskaŭ en ĉiuj urboj kaj urbetoj de Ĉinio.

Ankaŭ la usonaj kapitalistoj ludis gravan rolon en tiu krima kontrabando. Ili sendis la unuan ŝipon al Ĉinio en 1784 kaj jam komencis sian armitan kontrabandon. Ĉar la Orienta Hinda Kompanio monopoligis la opion fabrikitan en Hindio, ili devis iri la vojon de la duonrondo de la terglobo por aĉeti opion el Turkio kaj Persio kaj poste vendi ĝin en Ĉinio. Laŭ la tiama statistiko, preskaŭ ĉiuj usonaj komercistoj en Kantono estis implikitaj en la opian komercon.

Perkins kaj Kompanio de la dudekaj jaroj de la 19-a jarcento kaj Russell kaj Kompanio de la tridekaj jaroj ambaŭ estis usonaj grandegaj establoj entreprenantaj opian negocon en Ĉinio. Por fari grandskalan armitan kontrabandon, la usonaj agresantoj precipe konstruis batalŝipon, kiu povis veturi pli rapide ol aliaj komercŝipoj. Kiam ili koluziis kun ĉinaj ŝipaj patroloj, ili senskrupule pafadis kaj trakis.

La usonaj agresantoj rabis multe da riĉaĵoj de la ĉina popolo tra opia kontrabando. En 1824, iu komercisto konfesis, ke li ne persipis unu arĝentan do-

laron al Ĉinio en la pasintaj tri jaroj, kvankam li ĉiujare persipis el Ĉinio komercaĵojn, ĉefe silkon kaj kotonajn ŝtofojn, kiuj valoris proksimume milionon da arĝentaj dolaroj.

Opia kontrabando fariĝis pli kaj pli furioza en Ĉinio pro tio, ke la britaj kaj usonaj invadantoj subaĉetis la oficistojn de King-registaro. Iu brito rakontis en siaj rememoroj: “Tiu kunuloj kutime ricevis po 5 — 10 dolarojn por kesto, kion ili petis de la kapitano konservi, ne pere de la ĉinaj kontrabandistoj. Unufoje en monato ili vizitis la ŝipojn por akiri pagon laŭ la kestonombro.”

La britaj kaj usonaj komercistoj alprenis malestimindajn rimedojn kombini korupton kun kontrabando, opio ŝprucis en Ĉinion kiel venenaj nigraj torrentoj. La jara importo de la narkotaĵo restis ĉe 5,000 kestoj en 1821 kaj leviĝis ĝis pli ol 10,000 kestoj en 1831.

La jaro 1834 estis grava en la malhonorega historio de la opia komerco. La opozicio de la kreskanta brita industria kaj komerca kapitalista klaso al la Orienta Hinda Kompanio en la monopollo de komerco kun Ĉinio rezultigis ĝian forigon fare de la brita registaro en tiu jaro, sekve la lasta starigis komercadon kun Ĉinio por la tuta brita burĝaro. Por konveni al tiu nova situacio, la brita registaro nomis William John Napier, skotlandan nobelon kaj altran-

gan oficiron en la brita militŝiparo, ĉefa kontrolisto de brita komerco en Ĉinio. Antaŭe, la prezidanto de elektita komitato de la Orienta Hinda Kompanio en Kantono estis sola komerca reprezentanto de la brita registaro, kaj ĝi ne havis oficialan konstantan diplomatan reprezentanton en Ĉinio. Profitante tiun okazon, la britaj invadantoj intencis starigi diplomatajn rilatojn kun King-registaro kun la celo realigisian agresan ambicion malfermi plimulte da havenoj por la opia komerco, ekspansiigi ĉina-britan komercon kaj akiri iom da militŝipaj bazoj.

Napier alvenis al Aŭmen en 1834. Kiam neniu el liaj agresaj postuloj estis kontentigita, li fariĝis agacega kaj en la 5-a de septembro ordonis du britajn militŝipojn bombardi la fortikaĵojn ĉe Humen. Li ankaŭ bruegis, ke milito inter Britio kaj Ĉinio estis proksima kaj ke Ĉinio devis porti la tutan respondecon por ĝi.

Napier baldaŭ mortis. La brita registaro difinis unue Sir George Best Robinson, eksprezidanton de la elektita komitato de la Orienta Hinda Kompanio en Kantono, kaj poste Charles Elliot, antaŭan veteranan kolonian oficiron en la kolonio de la brita Gujano, kiel ĉefajn kontrolistojn de brita komerco en Ĉinio. Ascendinte al potenco, tiuj du per ĉiuj penoj faciligis la armitan opian komercon kaj malsukcesigis la penojn de Ĉinio por malpermesi ĝin.

Robinson eĉ transloĝigis sian oficejon el Aŭmen al kutro ankrita ĉe Lingding por ke li povu pli bone helpi la britajn opiajn komercistojn. En 1837, sub la subteno de Elliot, la britaj kaj usonaj opiaj komercistoj sukcesis ŝtele enigis en Ĉinion 39,000 kestojn da opio kun valoro de 25 milionoj da usonaj dolaroj.

Tiuj grandegaj importoj de opio alportis teruran katastrofon al Ĉinio. Komence nur aristokratoj, oficistoj, bienuloj kaj riĉaj komercistoj fumis la narkotaĵon. Poste, ankaŭ ĉiuj tiuj alkroĉiĝantaj al la reganta klaso, kiel kortaj eŭnukoj, registaraj servistoj, palankenistoj, soldatoj, monaĥoj kaj monaĥinoj, taoist-pastroj kaj urbaj publikulinoj, fumis ĝin. Laŭ la statistiko de 1835, pli ol 2 milionoj da popolanoj alkutimiĝis al fumado de la narkotaĵo.

La opia komerco malordigis la favoran saldon de Ĉinio longe konservitan en la fremda komerco. La eksportitaj teo, kruda silko, ŝtofo kaj medicinaj drogherboj estis nesufiĉaj por pagi por la opio, kaj grandnombro da arĝento komencis elflui. Post 1821, de kiam la nivelo de opia kontrabando altiĝis abrupte, la manko de arĝento etendiĝis ne nur en la marbordaj provincoj, sed ankaŭ en aliaj partoj de la lando. La britaj statistikoj indikis, ke elfluo de arĝento el Ĉinio al Britio de 1823 ĝis 1834 valoris la timige altan ciferon de 25.2 milionoj da dolaroj. Laŭ la plej konservativa takso, almenaŭ 100 milionoj da

dolaroj, kvinono de la totala cirkula sumo de arĝento en Ĉinio, elfluis el Ĉinio en la 20 jaroj, 1821 — 1840, antaŭ la Opia Milito. La meznombra jara perdo de 5 milionoj da arĝentaj dolaroj egalas dekonon de la jara enspezo de King-registaro.

La elfluo de arĝento rezultigis seriozan krizon, ĉar la takso de arĝento plivalorigis ol prezo de kupro, arĝenta kaj kupra moneroj estis la du specoj de mono tiam uzataj. En la fino de la 18-a jarcento, oni povis interŝanĝi 700 — 800 kuprajn monerojn por 1 *liang*-o da arĝento. En la tridekaj jaroj de 19-a jarcento, tamen, 1,600 — 1,700 estis bezonataj por akiri la saman sumon da arĝento, la valoro de arĝento duoble kreskis dum 30 jaroj.

Kampanoj kaj metiistoj senpere suferis de la kreskanta prezo de arĝento, ĉar la merkataj prezoj de agrikulturaj kaj metiaj produktaĵoj estis kalkulataj per kupraj moneroj, dume, ili, devigitaj pagi al la registaro impostojn per arĝento, devis unue interŝanĝi siajn kuprajn monerojn por arĝento. La altiĝo de arĝenta prezo multe pezis la ŝarĝon de la laborantaj popolanoj, kaj samtempe, la grandkvanta elfluo de arĝento eligis financajn krizojn por King-registaro. Kun ĉiam malmultiĝanta arĝento, kolekti impostojn fariĝis pli malfacila, la provincoj restis multe malproksime en sia livero de impostaj pagoj, kaj la ŝtata kasmono reduktiĝis tagon post tago. Plue,

opia fumado inter oficistoj kaj en la armeo korodis la tutan regantan aparaton, kaj kontrabando kaj subaĉeto pli koruptis ĝin. Tial, la opia problemo fariĝis problemo, pri kiu la reganta klaso serioze maltrankviliĝis kaj zorgis.

La ĉina popolo delonge jam estis profunde maltrankvila pri la disvastigo de opio kaj firme postulis malpermesi ĝin. De la komenco de la tridekaj jaroj de la 19-a jarcento, la King-registaraj oficistoj iom post iom dividiĝis en du grupojn: iuj pledis por plena malpermeso, la aliaj por legitimado. Tiuj en la antaŭa grupo, malkontentaj pri la letargia kaj surfaca maniero, postulis, ke kaj opiaj komercistoj kaj fumantoj devis esti severe traktataj. Tiuj, kiuj favoris legitimadon, opiniis, ke laŭleĝaj rimedoj, kiel ajn rigoraj, neniam povis elimini la uzon de la narkotaĵo kaj estis pli saĝe kolekti imposton de opio por faciligi la financajn problemojn ol ke arĝento konstante elfluis.

En junio de 1836, oferisto Hju Najgi sugestis en petskribo al la imperiestro Daŭguang, ke la malper-

meso de opio devis esti limigita. Rilate al opia komerco, ĉiuj malpermesaj reguloj devis esti nuligitaj kaj libera importo por fremdaj komercistoj devis esti oficiale denove permesata, kondiĉe ke opia dogano devis esti pagata laŭ tarifo de medicinaĵoj. Tamen, por bari la elfluon de arĝento, nur interŝanĝo de objekto kontraŭ objekto povis esti permesata, kaj opia komerco per arĝento povis esti malpermesata. Rilate uzon de opio, la petskribanto opiniis, ke limigoj devis esti farataj al registaraj oficistoj kaj soldatoj, dum ordinaraĵoj povis fumi laŭ sia plaĉo. Ĉar li rezonis, ke kvankam opifumado certe mallongigis homan vivon, tamen ĉina loĝantaro estis kreskanta, tial ili ne bezonis ĉagreni, ke la kapoj povis reduktiĝi. Pri la opia kulturado li ankaŭ porpledis la politikon permesi al ĉiu ajn kulturi, se nur tiu deziris, en la kredo ke kiam sufiĉe da popolanoj ĝin kulturis, importado de la narkotaĵo ne estis profitdona kaj la fremduloj forlasis la komercon propravole.

Evidente, tiu propono, kiu intencis legitimi la kontraŭleĝan opian komercon, kuraĝigi la devastigon de la narkotaĵo kaj logi la laborantajn popolojn por ke ili kulturu kaj fumu, portis grandan difekton al la lando. Tuj post sia apero, la propono estis aplaŭdita de Elliot, ĉefa protektanto de la britaj opiaj kontrabandistoj. Elliot tuj sendis

raporton pri la "bonaj informoj" al siaj superuloj kaj malpacience atendis la proklamon de la legitimado.

La ĉina popolo, tamen, firme opoziciis al la absurda ideo pri la legitimado. Eĉ iuj oficistoj de King-registaro petskribis al la imperiestro Daŭguang por refuti la proponon de Hju Najgi kaj pledi por plena malpermeso. En 1838, etiketisto Huang Gjuezi skribis al la imperiestro, ke la opia malpermeso estis malefika en la pasinteco pro la sabotado de registaraj oficistoj ĉe diversaj niveloj, kiuj havis personajn interesojn en la opia komerco. Li akre montris, ke se la situacio estus permesata daŭrigi, la prezo de arĝento daŭre leviĝus, la rezervaj arĝentoj de la ŝtato malpliĝus, ĝiaj fontoj de enspezo sekiĝus kaj ne estus mono por pagi elspezon, do ĉio ĉi tio certe kaŭzus neimageblan rezulton. Li proponis, ke opifumantoj devis esti severe traktataj, postulante, ke ili devu liberigi sin de la kutimo dum jaro; jen estu peze puni la malobeintojn inter la ordinaraj popolanoj, kaj ankoraŭ pli severe tiujn inter la registaraj oficistoj. Li opiniis, ke se ĉiuj fumantoj ĉesus uzi la narkotaĵon, ĝi malaperus sen malpermeso.

Varma debato pri la opia malpermeso tiam komenciĝis inter la regantoj de King-dinastio, kaj la imperiestro Daŭguang sendis la proponon de

Huang Gjuezi al ĉiuj provincestroj kaj generalgubernatoroj por ke ili esprimu siajn opiniojn. La rezulto estis 8 por la propono kaj 20 kontraŭ ĝi, kun Lin Zehju (1785 — 1850), tiama generalgubernatoro de Hubej- kaj Hunan-provincoj, en la malplimulta parto, kaj kun Kiŝan, generalgubernatoro de Ĝili-provinco, inter la plimulto. Tio montris, ke estis malforta la forto por la opia malpermeso ĉe la supro de la registara hierarkio.

La debato en la supra tavolo de la reganta klaso de King-dinastio okazis en la tempo, kiam grandkvante da opia importaĵo serioze minacis ĝian reĝimon. Ambaŭ flankoj estis kun motivo stabiligi sian feŭdan regadon. Sed, kiam plimultiĝantaj opiaj importaĵoj endanĝerigis la ekziston de la ĉina nacio, sendube, politiko de plena malpermeso estis ĝusta.

Dum la debato la imperiestro Daŭguang ekkomprenis, ke opio minacis lian regadon, kaj inklinis al plena malpermeso. Li estis precipe impresita de la argumento de Lin Zehju: “Opio estas ekstreme malutila kaj devas esti senkompate malpermesita. Se aferoj estas permesitaj gliti, mi timas, ke post kelke da dekjaroj Ĉinio ne havos soldatojn kapablajn rezisti malamikojn kaj ne havos sufiĉe da arĝento por financi armitajn fortojn.” La averto prezentis al la imperiestro la seriozecon de la situacio, kaj li eksigis Hju Najgi kaj alvokis Lin Zehju al Pekino por dis-

kuti pri rimedoj alprenotaj por malpermesi opion. Kiam la debato pri opia malpermeso leviĝis, Lin Zehju, tiama generalgubernatoro de Hubej kaj Hunan, alprenis aktivajn rimedojn en la regiono de li regata kaj akiris elstarajn sukcesojn. Li alvenis al Pekino en decembro 1838 kaj ricevis multajn aŭdiencojn ĉe la imperiestro Daŭguang antaŭ ol li estis fine nomita kiel imperia komisaro, por komando de militŝipaj fortoj en Guangdong, kaj estis sendita por opia malpermeso ĉe Kantono.

La afero tute ne estis facila ne nur pro tio, ke la britaj invadantoj subfosis ĝin, sed ankaŭ pro tio, ke jam formiĝis la putra forto de fumantoj, komercistoj kaj koruptituloj inter la ĉinoj mem. Tiu ĉi putra reakcia forto estis reprezentata de Muĝang'a, manĉuria nobelo, kiu servis kiel ĉefa konsilanto kaj ĝuis kompletan fidon de la imperiestro, kaj de Kiŝan, generalgubernatoro de Ĝili. Ili estis kontraŭaj kaj al plena malpermeso de la narkotaĵo kaj al ĝia legitimado, ĉar por akiri subaĉetojn ili dependis ne nur de la opia komerco, sed ankaŭ de la kontrabando. Fakte, ili agis kiel agentoj de fremdaj opiaj komercistoj. Kiam la porpledantoj de malpermeso okupis la superan pozicion, ili komencis sekretan sabotadon. Sed, kiam la britaj agresantoj lanĉis la militon, tiuj kapitulacistoj eliris por publike ataki la porpledan-

tojn reprezentatajn de Lin Zehju, damaĝante naciajn interesojn.

Antaŭ ol Lin Zehju venis al Kantono, jam disvastiĝis popola batalo en Guangdong kontraŭ britaj kaj usonaj opiaj komercistoj. Sub la firma postulo de la popolo, la tiama generalgubernatoro de Guangdong- kaj Guanghi-provincoj Deng Tingĝen, kiu antaŭe inklinis al legitimado, ŝanĝis sian opinion kaj poste pledis por plena malpermeso. Sub la de li alprenitaj rimedoj kontraŭ la narkotaĵo, dekmiloj da fumantoj cedis siajn pipojn kaj esprimis sian decidon por forlasi la kutimon. Grandnombre da lokaj kanajloj, kiuj vivis de la enspezo de opia kontrabando, forkuris pro timo. Multe da britaj kaj usonaj opiaj komercistoj timis, ke la kreskanta kontraŭopia movado estu malutila al iliaj interesoj. En la 12-a de decembro 1838, ĉina opia komercisto estis kondukita de la oficistoj de King-registaro al la placo antaŭ la fremdaj faktorioj por esti strangolita. Britaj kaj usonaj opiaj komercistoj senhonte disrompis la krucon kaj forpelis la oficistojn kaj ekzekutistojn. Tiu serioza atenco de ĉina suvereneco nature incitis grandan indignon ĉe la popolo kaj manifestacion ĉirkaŭantan la fremdajn faktoriojn.

Iu vidinto, amerika opia komercisto, donis rakonton: "La sieĝo de la popolamasoj daŭris tra la tuta posttagmezo, la gardistoj ĉe la angulo de la

amerika faktorio estis devigitaj retiriĝi . . . , kaj aferoj ŝajnis tre seriozaj.” Tie kolektiĝis “minimume okmil — dekmil manifestaciantoj, kiuj ŝajne estis decidaj por detrui la ‘fremdajn diablojn’. Ĉirkaŭ la kvina horo iu sugestis, ke ni devis anonci pri nia situacio al Vu Haŭguan (la monopola komercisto Vu Dunjuan) . . . Sinjoro G. Nye kaj mi sukcesis grimpi trans la tegmenton kaj post iom da klopodo ni trovis la maljunan sinjoron . . . Kaj li skribis al la Kantona magistratano. Ĉirkaŭ sesa kaj duona horo ni aŭdis la proksimiĝantan tamtambroadon signifantan la alvenon de la oficiroj, kio multege kvietigis nin, kaj vidis tra nia verando la tujan disigon de la ‘kanajlaro’ per vipoj. Ili forpelis la popolamasojn for de la placo kaj eĉ dronigis multajn en la riveron . . . Large malfermiĝis la pordoj de la faktorioj, kaj aperis neskribebla ĝojo sur iliaj vizaĝoj. La mandarenoj pasis la nokton sur la tero, seĝoj estis havigitaj por ili, oficialaj lanternoj estis lumigitaj . . . La sekvantan tagon ĉio ree estis en la normala stato de komforto kaj sekureco. La ‘krimulo’ estis strangolita ĉe la publika ekzekutejo . . . Ni alvenis al la mandarenoj en la mateno por danki ilin pro ilia ĝustatempa helpo . . . Ili akceptis nin tre ĝentile kaj certigis nin, ke tie estas nenio timinda.”

Tiu ĉi rakonto klare malkaŝas, kiel la ŝtorma forto de tiu ĉi spontanea popola batalo teruris la fremdajn agresantojn. Ĝi malkovris ankaŭ la malhonoregan konduton de la monopolaj komercistoj, prapatroj de la ĉina kompradora klaso, kiuj tutkore servis por la interesoj de la invadantoj. Fine, ĝi elmontris, kiel la feŭdaj regantoj de King-reĝimo, antaŭ la fremda humiligo, anstataŭigante batalon per subteno, sin turnis por subpremi la popolon kaj protekti la agresantojn! Ĉio ĉi tio atestis, ke de la komenco la ĉina popolo kaj la reakcia feŭda reganta klaso alprenis tute malsamajn sintenojn antaŭ fremda agreso. La antaŭa persistis je linio de firma rezisto, kaj la lasta je tiu de kapitulaco.

Alveninte al Kantono en marto 1839, Lin Zehju estis pli konvinkita pri opia malpermeso sub la forta popola premo por batali kontraŭ la fremdaj agresantoj. Li ordonis fortigi la marbordajn defendojn kaj aresti la opiajn komercistojn. En la 18-a de marto, li informis, ke la fremdaj komercistoj starigu inventaron de sia opio sur la surterigaj ŝipoj en tri tagoj kaj atendu opian detruon. Ili estis ankaŭ postulataj subskribi garantion, ke ili neniam plu venigu opion al Ĉinio. En tiu edikto Lin Zehju firme esprimis: "Mi ne foriros el Kantono ĝis la alfluo de opio estos barita. Mi solene ĵuris zorgi pri tiu ĉi afero ĝis ĝi

estos kontente aranĝita, kaj nenio povos obstrukci min en tiu ĉi afero.”

Tiuj rimedoj forte batis la fremdajn kontra-bandistojn, kaj Charles Elliot, ĉefa brita komerca kontrolisto en Ĉinio kaj reprezentanto de la brita registaro, decidis subfosi ilin. Li protestis kontraŭ la starigo de defenda instalaĵo ĉe Kantono, donis ordonojn al la surterigaj ŝipoj kun opio ekster la estuaro de la Perla Rivero forkuri kaj prepari batalon kaj komencis devigi la britajn komercistojn foriri el Kantono.

Por ataki la subfosadon de Elliot, Lin Zehju sekvis la kutiman proceduron de “sigeli la holdojn, kiam reguloj estas malobservitaj”. Li haltigis tutan komercon, sendis soldatojn por meti la fremdajn faktoriojn sub observadon kaj ordonis retiri ĉinajn servantojn el iliaj loĝejoj kaj interrompi komunikon inter la surterigaj ŝipoj kaj la fremdaj faktorioj. Vidante la vanecon de barbara rezisto, Elliot ŝanĝis siajn taktikojn kaj ordonis la britajn komercistojn cedi sian opion, promesante, ke la brita registaro donos al ili kompenson. Por venigi la usonajn opiajn komercistojn en kunagon, li persvadis ilin fari ĉion ankaŭ en la sama kondiĉo. Lia krima intenco estis pliigi la trakton de Lin Zehju pri la kontraŭleĝa opia komerco al la nivelo de internacia problemo inter

Ĉinio kaj Britio, por ke la brita registaro havu pretekston por milito.

De la lasta tagdeko de aprilo ĝis la dua tagdeko de majo 1839, la britaj kaj usonaj komercistoj cedis 20,283 kestojn kaj pli ol 2,000 sakojn da opio, sume pli ol 2 milionojn da ĝin-oj (mezurunuo de pezo, uzata en Ĉinio kaj egalvalora al 0.5 kg.). Ĉiuj tiuj estis publike detruitaj de la 3-a kaj ĝis la 25-a de junio sur plaĝo ĉe Humen, kun fremduloj inter multaj rigardantoj. Kiam la detruo de la opio estis anoncita, iuj fremdaj agresantoj (kelkaj klerikoj inter ili) kalumniis, ke la ĉinoj neniam detruos eĉ *liang-on* da opio kaj ke, se ĝi iam estos provita, plejparto de ĝi estos ŝtelita. Sed, tiuj kiuj venis por la vidaĵo konfesis, ke ili estis eraraj. La kleriko E. C. Bridgman skribis: "La grado de zorgo kaj fideleco, kun kiu la tuta laboro estis kondukita, multe superis niajn supozojn . . . "

La detruo de opio ĉe Humen estis venko de la ĉina kontraŭopia politiko, elmontrante al la tuta mondo la decidon de la ĉina popolo por malpermesi komercon en la venena drogo kaj firman volon por oponi kontraŭ fremda agreso.

Opia komerco estis fonto de riĉiĝo por la brita burĝaro kaj tiu de enspezo por ĝia registaro. Sed, la britaj agresantoj ne koncedis sian malvenkon. Kiam la britaj komercistoj estis cedantaj sian opion,

Elliot estis preparanta por puŝi agresan militon. En la 3-a de aprilo 1839, li sugestis en raporto al la brita ministro pri fremdaj aferoj Lord Palmerston, ke la plej bona rimedo trakti Ĉinion por Britio estis malkaŝi nenion unue kaj poste doni subitan frapon al ĝi. En siaj multaj postaj raportoj, li multfoje urĝigis la britan registaron lanĉi agresan militon.

Post detruo de opio, Lin Zehju persistis en sia malpermesa politiko. Li postulis, ke la kapitano de ĉiu fremda komercŝipo eniranta en la havenon de Kantono subskribu kontrakton, ke lia ŝipo neniam portos opion al Ĉinio; en la kazo de malobservo, la kargo estos konfiskita kaj la personoj estos mortpunitaj. Dume, li daŭrigis militajn preparojn. Li kaj admiralo Guan Tianpej direktis la guangdongajn akvfortojn en preparado, kaj la fortikaĵoj ĉe Humen estis fortigitaj per riparado kaj aldonado al kanonaj pozicioj. Tie nombro de kanonoj pliiĝis ĝis 300. Du vicoj da lignaj fostoĵ kunigitaj per ferĉenoj estis ĵetitaj trans la plej mallarĝan punkton de la Perla Rivero por bari la transpason de britaj militŝipoj; du baterioj estis starigitaj ĉe Gianŝazuj-a areo kun 56 kanonoj; gvardioj estis postenigitaj ĉe ĉiu grava loko kaj akva pasejo.

Lin Zehju ankaŭ alvokis la popolanojn al organizado de siaj propraj fortoj kaj varbis 5,000 virojn el inter surŝipaj loĝantoj kaj fiŝkaptistoj por

helpa marforto konata kiel la "akvaj bravuloj". Ili estis trejnataj por fari rekognoskon kaj subitajn atakojn al malamikaj ŝipoj por helpi la soldatojn en batalo, kiam estis necese. Ĉiu persono ricevis pagon de ses arĝentaj dolaroj monate kaj de aliaj ses kiel familia monsubteno.

Tia decido antaŭ armita invado distingis Lin Zehju de la kapitulacistoj de la bienula klaso. Tamen, li estis, kompreneble, membro de la feŭda reganta klaso, kvankam li havis ion komunan kun la popolo en opono kontraŭ agreso, kaj tial klasaj kontraŭdiroj ankoraŭ ekzistis inter li kaj la popolo. Pro tiu kaŭzo, li havis seriozajn dubojn pri varbitaj surŝipaj loĝantoj kaj fiŝkaptistoj. Li diris, ke pri ili oni devis fari multe da zorgo kaj varbi ilin estis nur por portempa oportuno. Li kondiĉis, ke iliaj familioj devis esti zorge esploritaj kaj garantianto devis esti bezonata por ĉiu rekruto. Se iu ajn estis trovita ne fidinda, li tuj devis esti forpelita kaj sendita hejmen kaj metita sub observadon por malebligi lin fari malbonon en la estontece. Tio ĉi montris, ke Lin Zehju, kiel membro de la bienula klaso, ne povis vere mobilizi la popolamasojn por kontraŭstari agreson.

En respondo al firma efikigo de la opia malpermeso kaj defendaj preparoj de Lin Zehju, Elliot, urĝigante sian registaron lanĉi militon, ordonis la britajn komercistojn rifuzi la subskribon de la inter-

konsentoj, por ne cedi opion kaj daŭrigi sian armitan kontrabandon en larĝa skalo, kaj provokis ofte armitajn konfliktojn.

En julio 1839, ĉe Gianŝazuj de Giulong britaj maristoj batvundis multajn vilaĝanojn, el kiuj Lin Vejhi grave vundiĝis kaj mortis. Lin Zehju multfoje postulis, ke Elliot transdonu la kulpulon al la ĉina registaro. Elliot ne nur rifuzis transdoni, sed ankaŭ faris juĝadon en ĉina teritorio, kun intenco atenci la suverenecon de Ĉinio. En aŭgusto, Lin Zehju ordonis ĉesi provizi la britojn per manĝaĵoj, kaj Elliot tiam lanĉis armitan provokon. Je la 2-a horo post tagmezo de la 5-a de septembro, li ordonis britajn ŝipojn kanonadi kontraŭ tri patrolajn ŝipojn de la ĉina militŝiparo de Giulong. La ĉinaj maristoj reatakis kuraĝe, kaj ankaŭ la baterioj komencis pafi. En tiu batalo, laŭ rememoro de iu juna brita maristo, la pafado de ĉinoj estis "firma kaj trafa", kaj li skribis, ke li esperis neniam plue partopreni en tia batalo.

En sia persista rifuzo permesi la britajn komercŝipojn subskribi kontraktojn, Elliot dependis ĉefe de subteno de la usonaj agresantoj. Tiam, usonaj ŝipoj transportis varojn por la britoj, kaj eĉ britaj komercŝipoj envenis en la havenon de Huangpu sub la usona flago. Poste Elliot al usona opia komercisto, Robert Forbes, kiu estis administranto

de Russell kaj Kompanio, parolis: "Mia kara Forbes, la reĝino ŝuldas al vi multajn dankojn . . . Ni jam enportis ĉiujn varojn kaj elportis plenan provizon de teo kaj silko. Se la usonaj firmoj ne restus en sia posteno, la angloj eble enirus. Mi ne havis forton por malhelpi ilin eniri."

Ĉio ĉi tio plene malkaŝis, ke Usono agis kiel kunkrimulo de la britaj agresantoj ekde la komenco de la milito.

Sed, Elliot ne sukcesis komplete en sia peno malhelpi britajn komercistojn subskribi la kontraktojn. En oktobro 1839, la kapitano de la komercŝipo, la *Thomas Coutts*, subskribis la kontrakton kaj venis en la havenon spite la malpermeson de Elliot. Post nelonge la kapitano de la *Royal Saxon* petis subskribi la kontrakton.


Tio furiozigis Elliot. En la 3-a de novembro, kiam la *Royal Saxon* alproksimiĝis al la haveno, Elliot ekspedis du militŝipojn por obstrukci ĝin kaj ili komencis pafi kontraŭ ĉinajn militŝipojn, provokante la furiozan batalon de Ĉuanbi. Sub la komando de admiralo Guan Tianpej, la ĉinaj fortoj brave batalis du horojn. Fine, la britaj militŝipoj retiriĝis al la publika maro, kaj unu el ili vundiĝis.


Elliot ne pentis post la malvenko suferita ĉe Ĉuanbi. En la tagoj de la 4-a ĝis la 13-a de novembro, li sesfoje provokis incidentojn en la areo de Guan-

jong ĉe la estuaro de la Perla Rivero, kiuj estis debatitaj. Tiuj bataloj estis preludo de la milito inter Ĉinio kaj Britio. En januaro 1840, laŭ la instrukcio de la imperiestro Daŭguang, Lin Zehju proklamis la formalan fermon de la haveno de Kantono kaj la ĉesigon de komerco inter Ĉinio kaj Britio.

Britaj Agresantoj Alkondukis Militon al Ĉinio 4

Komercaĵo, opio kaj kanono estis la tri armiloj uzitaj de la britaj agresantoj por malfermi la pordon de Ĉinio. Pli ol dek jarojn antaŭ la Opia Milito, la britaj opiaj kontrabandistoj jam komencis prepari publikan opinion por la milito kaj kolekti rilatan informon. En 1823, James Matheson, ĉefa opia kontrabandisto, faris rekognoskan ekspedicion de pli ol 500 kilometroj laŭlonge de la ĉina marbordo. En 1827, en Aŭmen tiu sama Matheson funkciigis ĵurnalon, la *Kanton-a Registro*, kiu malkaŝe advokatis por agreso. En 1832, la kanton-a branĉo de la Orienta Hinda Kompanio, stabo de brita agreso en la Oriento, sendis sian spionan ŝipon, la *Lord Amherst*, por krozi ses monatojn laŭ la ĉina marbordo, Surŝipe estis du spionoj, H. H. Lindsay kaj Charles Gutzlaff, kiuj sisteme kolektis politikan, ekonomian





Mapo 2 Situacio apud Kantono dum la Opia Milito

kaj militan informojn pri Hiamen, Fuĝoŭ, Ningbo kaj Ŝanhajo — la gravaj havenoj laŭlonge de la sud-orienta marbordo. Laŭ la rezultoj de informo provizita en la antaŭaj jaroj, la britaj opiaj komercistoj planis la konkretajn militajn paŝojn, eĉ tiujn detalojn, kiel la nombron de homoj kaj kiajn tipojn de ŝipoj. Ili rapide faris detalan agresan planon, kiu estis prezentita al la brita ministro pri fremdaj aferoj Lord Palmerston en persona letero de Lindsay datita je la 24-a de julio 1835.

La Orienta Hinda kaj Ĉina Asocio estis starigita en Londono en 1836 kun membraro de 109 grandaj kompanioj, kiuj havis interesojn en Hindio kaj Ĉinio en tiuj kampoj, kiaj la import-eksporta komerco, ŝipado kaj financo. Ili konservadis kontaktojn kun la brita registaro, precipe kun la departemento pri fremdaj aferoj, kaj, konstante provizante informajn raportojn buŝe aŭ skribe, urĝigis la britan registaron fortigi batalon kontraŭ Ĉinio.

En la 5-a de aŭgusto 1839, la informo pri la malpermeso de opia komerco en Ĉinio atingis Londonon. Ĝi vekis tujan respondon de la agresa brita burĝara klico, kiu vokis urĝan kunvenon en la 7-a de aŭgusto por diskuti, kiel instigi la militon kontraŭ Ĉinio. Prezidanto de la kunveno estis John MacVicar, teksa kapitalisto, direktoro de la Manĉestra Komerca Asocio kaj opia komercisto. Li estis

la “konfidenca agento” en Manĉestro por Jardine Matheson kaj Kompanio speciala por opia kontra-bando. Ĉiuj tiuj ĉeestantoj estis grandaj burĝoj kun establitaĵoj intereso en la agreso al Ĉinio, kiaj G.G. de H. Larpent, prezidanto de la “Orienta Hinda kaj Ĉina Asocio” kaj opia egkomerco, kaj John Abel Smith, agento de William Jardine, alia opia egkomerco en Britio. Post la kunveno ili estis akceptitaj de Palmerston, kaj ili kune planis la militon.

La brita burĝaro nun senskrupule kreis publikajn opiniojn por lanĉi militon. La komercaj asocioj de Londono, Manĉestro, Liverpolo, Leeds, Glasgovo kaj Bristollo unuanime advokatis por firma kaj forta batalo kontraŭ Ĉinio kaj bruas pri milito. En la 21-a de septembro, ricevinte oficialan raporton de Charles Elliot pri opia malpermeso de Ĉinio, Palmerston tuj arogante deklaris, ke la sola rimedo por trakti Ĉinion estis unue doni al ĝi fortan baton kaj poste fari klarigon.

En la 1-a de oktobro, brita kabineto kunvenis por decidi lanĉi militon. En februaro 1840, George Elliot estis nomita kiel plenpovulo kaj Charles Elliot vicplenpovulo de la brita registaro por ke ili povu ĉantaĝi King-registaron per milita kaj diplomacia rimedoj. Post serio da preparoj, agresa forto estis kunigita de la brita registaro en aprilo 1840, kaj ĝi ampleksis 16 militŝipojn, 20 transportajn ŝipojn kaj

4 armitajn vaporŝipojn kun sume 540 kanonoj kaj 4,000 homoj. Tiu agresa forto estis komandata de George Elliot.

La instrukcio al tiu agresa ŝiparo estis blokadi la estuaron de la Perla Rivero, okupi Ĝouŝan-insularon kaj antaŭeniri norden al Tiangin por devigi King-registaron malfermi komercajn havenojn, fiksi komercan tarifon, pagi kompenson por la konfiskita opio kaj cedi kelkajn insulojn. Tiu ĉi plano estis bazita preskaŭ tute sur la informaj raportoj kaj sugestioj de la opiaj komercistoj Lindsay kaj Jardine. Palmerston skribis en privata letero de 1842: "Dank' al la helpo kaj informo, kiujn . . . sinjoro Jardine senavare donis al ni, ni povis doni al niaj militŝipa, milita kaj diplomacia aferoj en Ĉinio detalajn instrukciojn, kiuj kondukis al tiuj kontentaj rezultoj . . . " La "kontentaj rezultoj" aluditaj de li estis la Nankina Traktato, la unua el la neegalaj traktatoj inter Ĉinio kaj Britio. Ĉi tie Palmerston klare esprimis, ke la brita registaro sekvis la ideojn de opiaj komercistoj en sia agresa plano, kaj ĉio ĉi tio indikis la malnoblan naturon de la milito.

Ĉe la komenco de junio 1840, la britaj militŝipaj fortoj alveturis al la Guangdong-a marbordo por invada provo. Tiutempe Lin Zehju estis nomita generalgubernatoro de Guangdong kaj Guanghi, kaj sub lia komando la Guangdong-a marbordo estis

bone defendita kaj la brita atenco malsukcesis. En la 30-a de junio, la brita ŝiparo forveturis de Kantono norden por invadi Hiamen, sed estis repuŝita de la ĉinaj fortoj sub la komando de Deng Tingĝen, nova generalgubernatoro de Fugian kaj Ĝegiang.

En la 2-a de julio, la brita invadanta ŝiparo atingis Dinghaj en Ĝegiang-provinco. Ĉar King-registaro ne faris antaŭpreparon kontraŭ milito laŭlonge de la marbordo krom en Guangdong kaj Fugian, la britoj okupis Dinghaj en la 5-a de julio. La piratoj komencis rabi la urbon tuj kiam ili surteriĝis. Laŭ sia okulvido iu invadanta oficiro rakontis: "Kiam la trupoj surteriĝis kaj la brita flago flirtis, konsternega rabado komenciĝis. Ili perforte eniris en ĉiun domon kaj traserĉis ĉiujn tirkeston kaj kofron, kaj la stratoj estis disŝutitaj per libroj, pentraĵoj, mebloj, ujoj kaj nutraĵoj . . . Ĉiuj tiuj estis forprenitaj . . . La rabado ĉesis nur kiam ĉio valora estis forrabita." Tia barbara konduto de la britaj agresantoj okazis ne nur en Dinghaj, sed tra la tuta milito.

Uzante Dinghaj kiel bazon, la ĉefaj fortoj de Britio ekiris norden. En la 11-a de aŭgusto, ili atingis Dagu proksime al Tiangin kaj transigis leteron de la brita registaro al King-registaro, postulante la legitimadon de la opia komerco, la pagon de kompenso kaj la cedon de teritorio.

La kontraŭdiro inter la ĉina nacio kaj la fremdaj kapitalistaj invadantoj evoluis en militon, en kiu la vastaj amasoj postulis rezisti agreson. Kontraŭ tiu situacio King-registaro fendiĝis en du grupojn, unu favoris reziston kaj la alia kompromison. La antaŭa, kun Lin Zehju, Deng Tingĝen kaj Guan Tianpej kiel ĝiaj reprezentantoj, subtenis la opian malpermeson kaj advokatis por rezisto. La lasta konsistis el oficistoj, kiuj estis ĉiam kontraŭaj al la opia malpermeso aŭ timis, ke fremda milito skuos la fundamenton de ilia regado. Reprezentantoj de tiu grupo estis Muĝang'a, ĉefa konsilanto, Kiŝan, generalgubernatoro de Ĝili, kaj Ilibu, generalgubernatoro de Giangsu, Anhuj kaj Gianghi. Tiuj homoj manipulis grandan potencon en King-registaro. Kiam la opia malpermeso eniris en altan tajdon kaj la kontraŭagresa milito akiris venkon, ili sin tenis silentaj. Sed tuj post kiam Dinghaj falis, ili rompis sian silenton kaj komencis akuzi Lin Zehju, dirante, ke li invitis malfeliĉon per troa malpermeso de opio. Kiam la brita ŝiparo atingis Dagu, ili malkaŝe kalumniis antaŭ la imperiestro Daŭguang, ke la opia malpermeso kaŭzis la venon de la fremdaj fortoj, kaj ke Lin Zehju private disponis iujn komunikadojn kaj aliajn de la brita flanko. Vidinte, ke la invadantoj jam atingis la areon de Tiangin kaj minacis lian regadon, la imperiestro eksuspektis la farojn de Lin

kaj liaj kunuloj. La imperiestro ŝanceliĝis kaj ekspedis Kiŝan al Dagu por trakti kun la invadantoj. Tuj poste, Kiŝan deklaris, ke gajni venkon estis malfacile pro “fortikaj militŝipoj kaj fortegaj kanonoj” de la malamiko, kaj ke “eĉ se ili estas debatotaj ĉijare, ili povos veni venontjare, kaj milito, post komenciĝo, estas efektive senfina.” Kun tiu malvenkista teorio, li argumentis sian politikon de persvado, kio fakte egaligis kapitulacion kontraŭ agreso.

Ĉe la konferenca tablo kun la invadantoj, Kiŝan agis kiel senhonta apologiisto, dirante, ke la britoj estis insultitaj, kaj ke se ili venĝus sin ĉe Kantono, Lin Zehju certe meritus tion. Li plue certigis la malamikon, ke ĉiuj elmetitaj problemoj povos esti solvitaj por ilia kontentiĝo, se ili konsentos retiriĝi al Kantono kaj rekomenci intertraktadon tie.

Konsiderante la akceptitan postulon, la britoj estis pacigitaj. En la mezo de septembro, ilia ŝiparo komencis transmoviĝi suden.

En la 17-a de septembro, la imperiestro Daŭguang komisiis Kiŝan kiel imperian komisaron pro lia “merito” en deteno de la malamiko kaj sendis lin al Kantono por daŭrigi la intertraktadon kun la britoj. Post kelkaj tagoj, King-registaro deklaris Lin Zehju kaj Deng Tingĝen kulpaj pri “mistraktado de la tuta afero” kaj eksigis ilin de ofico por atendi esploron.

Dum kelkaj monatoj, post kiam la brita armeo okupis Dinghaj, 488 homoj — pli ol dekono de la totala nombro — mortis de infekta malsano, kaj pli ol 1,500 homoj enhospitaliĝis. Tiam velŝipoj estis ĉefaj en veturado, kaj kvar aŭ kvin monatoj estas bezonataj por britaj ŝipoj en alporto de helptrupoj kaj provizoj el Britio al Ĉinio tra la Bonesperan Kabon. Ilia stato estis tute malbona ankaŭ pro tio ke la popolo de Dinghaj rifuzis rilati al la okupantaj soldatoj. Ankaŭ la kamparanoj embuskis por kapti aŭ mortigi tiujn invadantojn, kiuj kuraĝis rabi grenon, bovojn aŭ fiŝojn. Kiam la brita ŝiparo trairis la Ĝegiang-an marbordon sur la vojo al la Sudo, admiralo Elliot urĝigis solvon de tiu afero en intertraktado kun Ilibu, la imperia komisaro, kiu gardis la defendon de tiu ĉi areo. Ilibu estis la generalgubernatoro de la provincoj Giangsu, Anhuĵ kaj Gianghi kaj nove postenigita nur post la falo de Dinghaj, kun la misio por rehavigi la perditan teritorion. Sed, simila al Kiŝan, li estis malfortikulo, inkлина al kapitulaco. En la 6-a de novembro, li faris militĉesigon kun admiralo Elliot, kio ebligis la britojn transigi iujn de siaj trupoj el Ĝegiang por fortigi siajn fortojn ĉe Kantono.

Kiŝan alvenis al Kantono en la 29-a de novembro 1840. Por indulgi la invadantojn per koncedo al ili, li nuligis multon faritan de Lin Zehju, maleki-

pis defendajn instalaĵojn, malpliigis la marajn fortojn, disigis la akvajn bravulojn varbitajn de Lin kaj allasis la britajn kanotojn rekognoski la internajn akvovojojn.

Intertraktado inter Kiŝan kaj Charles Elliot komenciĝis en la komenco de decembro. George Elliot jam revenis al Britio pro malsano; Gordon Bremer plenumis lian rolon de la komandoro de la brita ŝiparo, kaj Charles Elliot estis reprezentanto por intertrakti kun King-registaro. Dum la traktado, ĉiuj liaj postuloj estis preskaŭ komplete akceptitaj de Kiŝan, kiu malkonsentis nur cedon de Hongkongo je sia propra respondeco, sed promesis, ke li petu permeson de la imperiestro Daŭguang por Charles Elliot.

Tamen, la britaj agresantoj estis tro malpaciencaj kaj en la 7-a de januaro 1841 okupis la fortikaĵojn ĉe Dagiaŭ kaj Ŝagiaŭ. La garnizona komandoro Ĉen Lianŝeng kaj lia filo mortis en la batalo kaŭze de manko de helptrupoj. La malamiko tiam entrudiĝis en Humen, kie admiralo Guan Tianpej kaj liaj subuloj brave batalis. Sed ilia peto pri helptrupoj estis ignorita de Kiŝan. Kiŝan tuj sendis delegacion tiunokte al Ĉuanbi apud Humen por subskribi la Konvencion de Ĉuanbi, konsentante pagi kompenson de 6 milionoj da arĝentaj dolaroj por la detruita opio,

remalfermi la havenon de Kantono kaj cedi Hongkongan.

Popola malkontento je malkuraĝo de Kingdinastio kontraŭ britaj postuloj kreskis kaj ankaŭ amasa kontraŭkompromisa batalo altiĝis. En Ĝenhaj de Ĝegiang-provinco pli ol 1,000 popolanoj petis Ilibu ne retiri la lokan garnizonon post la militpaŭzo. Aliaj sendis leterojn, postulante, ke Dinghaj estu reprenita. En Kantono la informo, ke laŭ la Konvencio de Ĉuanbi la britaj soldatoj okupis Hongkongan, incitis popolajn protestojn. La sinjoroj kaj intelektuloj de la bienula klaso, kiuj advokatis por rezisto, kunvenis por postuli la elpelon de britaj fortoj el Hongkongo, kaj registaraj oficistoj, kiuj favoris reziston, postulis la imperiestron eksigi Kiŝan kaj restarigi Lin Zehju kaj Deng Tingĝen por konduki la batalon kontraŭ la britoj. Ĝis nun la imperiestro Daŭguang opiniis, ke la brita ŝiparo venis norden al la areo de Tiangin por venĝo post la detruo de la opio, kaj se nur Lin Zehju kaj Deng Tingĝen estus punitaj kaj la haveno de Kantono remalfermita por ĉina-brita komerco, la invadantoj redonus Dinghaj al Ĉinio kaj paco alvenus. Tamen, Elliot denove elmetis eĉ pli da malraciaj postuloj en la plej tirana maniero kaj ne redonis Dinghaj. Sentante, ke la prestiĝo de la "Ĉiela Imperio" ricevis grandan ofendon pro ĉio ĉi tio, la imperiestro denove inkliniĝis al

rezisto. En la 6-a de januaro 1841, li deklaris, ke kompenso estu ne pagita, kaj ordonis la provincajn estrojn kaj generalgubernatorojn fortigi la marbordajn defendojn. Kiam la informo pri la falo de la fortikaĵoj de Dagiaŭ kaj Ŝagiaŭ atingis Pekinon en la 27-a de januaro, li estis tiel furioza, ke li tuj deklaris militon. Li ordonis Ilibu tuj fari ofensivon por rekapti Dinghaj, dum Kiŝan estis instrukciita mobilizi siajn trupojn por batalo. Post tri tagoj, la imperiestra nevo Iŝan estis titolita "Ribelsubiganta Generalo" kun Longven kaj Jang Fang kiel liaj konsilantoj. Ili komandis la fortojn de 17,000 homoj formiĝintajn el la diversaj provincaj armeoj por batali kontraŭ la britoj ĉe Kantono.

Tamen, la deklaro de milito fare de la imperiestro ne estis indiko de reala decido por batali kontraŭ agreso, ĝi signifis nuran "elmontron de for-teco", kaj pere de tio li atendis la forlason de la kompensa postulo kaj la rehavigon de perdita teritorio. Sekve, kiam Kiŝan, false prezentante la situation, petis permesi la britojn loĝi en la alborda insulo Hongkongo por interŝanĝi la redonon de Dinghaj kaj Ŝagiaŭ, la imperiestro estis preta je kompromiso, opiniante, ke Kiŝan estis ĉagrenata de la cirkonstancoj. Ĉe tiu tempo, tamen, Iliang, estro de Guangdong, komunikis al la imperiestro, ke Kiŝan private subskribis la Konvencion de Ĉuanbi, promesante

kompenson kaj cedante Hongkongon, kaj ke la Hongkong-a garnizono jam estis elpelita de la britoj kaj la loĝantoj estis devigitaj “esti lojalaj” al ili kaj fariĝi iliaj “regatoj”. Pago de kompenso kaj perdo de teritorio, ĉio ĉi tio por la imperiestro estis granda ofendo al “la prestiĝo de la Ĉiela Imperio”. Li insultis Kiŝan kaj tuj ordonis eskorti lin al Pekino en katenoj. Dume, li donis rigoran instrukcion al Iŝan kaj liaj konsilantoj rapidigi la kolekton de la provincaj fortoj kaj “subigi la ribelantojn sen ŝanceliĝo.”

Tiam, la britaj invadantoj jam aŭdis, ke help-trupoj venis al Guangdong, kaj ili ekbatis la unuaj por gajni superecon. En la 25-a de februaro, la brita armeo bombardis la Humen-fortikaĵon. La garnizono sub la komando de admiralo Guan Tianpej gastigis ilin per forta rezisto, kvankam Kiŝan ne donis al ili iun ajn subtenon. (La edikto pri Kiŝan ankoraŭ ne atingis Kantonon.) Spite multajn vundojn, Guan Tianpej mem eksplodigis kanonon en defendo de la fortikaĵo, sed ili estis malmultaj en nombro, kaj la fortikaĵo fine falis. Guan kaj centoj da defendantoj brave mortis en batalo. En la 27-a, kiam britaj militŝipoj eniris en enlandajn riverojn, Vujong-fortikaĵo falis sen batalo, ĉar la garnizona estro forkuris. Tiam Kiŝan retiris fortojn de la strategia punkto Erŝavej, lasante Kantonon malfer-

mita por la malamiko. En marto, la malamiko alproksimiĝis al la antaŭurbo de Kantono.

Tiam, Jang Fang, la nova vickomandoro, atingis Kantonon antaŭ Iŝan kaj Longven. En la 10-a de marto, fronte al malamika antaŭeniro en pluraj direktoj, estante absoluta kapitulacisto, Jang Fang retiris siajn fortojn en la urbon kaj ne sciis kion fari. Kaŭze de rekomenco de milito ĉe Kantono, britaj komercŝipoj kun kargo de 20,000 tunoj ne povis eniri en la havenon kaj 30 milionoj da funtoj da teo amasiĝis interne de ĝi, kaj nur la teo povis porti 3 milionojn da pundoj en imposto por la brita registaro. Pro tiel grandaj interesoj ĉe veto, Elliot proponis militpaŭzon kaj la rekomencon de komerco, kaj Jang Fang, multe kvietigante, tuj akceptis tion. Sub la militpaŭzo komerco estis rekomencita ĉe Kantono de la 20-a de marto ĝis la 21-a de majo.

Sed tiu militpaŭzo estis nur manovro de la britaj invadantoj por ebligi sin alporti helptrupojn. Post la militpaŭzo, Elliot sendis Bremer al Hindio por tiu intenco. Dume, en la 14-a de aprilo, Iŝan atingis Kantonon.

Iŝan estis la superega komandoro de la Kanton-a fronto sendita de King-kortego. Li enkorpigis la politikan koruptiĝon kaj militan senpovon de la reganta klico. En sia unua komunikaĵo al la imperiestro post la alveno, li diris: "La danĝero kuŝas

interne, ne ekstere.” Kalumniante, ke la Guangdong-a popolo, kiu advokatis por firma rezisto, estis kanajlaro, li diris: “Sin defendi kontraŭ la popolamaso estas pli grave ol kontraŭ la malamiko.” Li insultis la popolanojn kiel perfidulojn kaj eĉ sen-skrupule ekzekutis iujn el ili. Liaj timo kaj malamo al la popolo klare malkaŝis la akrajn klasajn kontraŭdirojn inter la regantoj de King-dinastio kaj la popolamasoj.

Iŝan estis plena de senbaza memfido. Post sia alveno al Kantono, li vivis diboĉan vivon, faris nenion por milita preparo kaj revis pri hazarda venko. En la 21-a de majo, li lanĉis noktan atakon al la brita ŝiparo, kiu, fortigita de helptrupoj el Hindio, jam frue sin preparis. Kaj la malamiko perdis nenion, sed grandnombro da ĉinaj ŝipoj apartenantaj al la ordinaraĵaj popolanoj estis bruligitaj. En la sekvanta tago, la brita armeo faris ofensivon, kaj en la 25-a, la King-aj trupoj nombrantaj pli ol 10,000 homojn retiriĝis de ĉiuj antaŭpostenoj, kaj la malamiko regis ĉiun avantaĝan punkton ĉirkaŭ la urbo. Tiam la britoj bombardis Kantonon de Sifangfortikaĵo, kiu estis pli alta favora loko. En la 26-a, agante laŭ informaj raportoj de perfiduloj, ili koncentris sian pafadon kontraŭ la imperian ekzamenan salonon en la sudorienta angulo de la urbo, kie Iŝan

kaj liaj kolegoj loĝis. Sin ĵetante en grandan panikon pro la forta pafado de la invadantoj, tiuj timuloj levis blankan flagon sur la urba muro. Ili sendis la prefekton de Kantono Ju Baŭcun kaj perfidan monopolan komerciston Vu Ŝaŭjong kiel delegitojn por peti pacon de la malamiko. Kaj la Paca Konvencio de Kantono estis subskribita laŭ kondiĉoj elmetitaj de la brita generalo Sir Hugh Gough.

La paca konvencio legiĝis: 1) Iŝan kaj liaj trupoj forlasu urbon Kantono kaj retiriĝu pli ol 60 mejlojn. 2) Pagu 6 milionojn da arĝentaj dolaroj en unu semajno por reaĉeto de Kantono; 1 milionon antaŭ sunsubiro de la 27-a de majo. 3) La britaj trupoj restu en siaj nunaj pozicioj portempe, ambaŭ flankoj ne estu fortigitaj. Se la reaĉeta prezo ne estus pagita en daŭro de sep tagoj, la sumo estus levita al 7 milionoj da arĝentaj dolaroj; se oni ne pagus la sumon dum 14 tagoj, ĝi leviĝus al 8 milionoj da dolaroj; se dum 20 tagoj, al 9 milionoj da dolaroj. La britaj fortoj retiriĝu ekster Humen, kiam la reaĉeta prezo estu plene pagita. 4) Sumo de 300,000 arĝentaj dolaroj devas esti pagita al la britaj faktorioj en kompenso por iliaj perdoj.

Unuflanke, la subskribo de la Paca Konvencio de Kantono malkaŝis la ekstreman putrecon de la reganta klika de King-dinastio; aliflanke, ĝi elmon-

tris, ke tiuj angloj tute heredis **“la malnovan rabistan piratan spiriton”*** de siaj prapatroj.

Tiu agresa forto, antaŭ la putraj regantoj de King-dinastio, estis ŝajne nevenkebla, tamen, estis malkaŝita en siaj veraj koloroj kiel papera tigro, kiam ĝi staris kontraŭ la granda ĉina popolo.

* Frederick Engels, “La Nova Brita Ekspedicio en Ĉinio”, aprilo 1857.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: **“Ĉiuj naciecoj de Ĉinio ĉiam kontraŭstaris fremdan subpremon kaj forigis ĝin kontraŭbatale.”***

De la komenco, la ĉina popolo faris firman reziston kontraŭ fremdaj kapitalismaj agresantoj, en kontrasto kun perfiduloj kiel Kiŝan kaj Iŝan. Kiam la batalo de Kantono komenciĝis, la popolo en la ĉirkaŭurbo aliĝis al ĝi propravole. En la Hiangŝan-a regiono 500 akvaj bravuloj estis organizitaj inter la amasoj por ataki la invadantan ŝiparon ĉe Baj’etan, kaj en la Hin’an-a regiono la popolo organizis tri ŝipetarojn de fajraj flosoj ŝargitaj per brulemaĵoj por fari noktajn atakojn al la britaj

* “La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio”, *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, p. 297. Vol. II. 1973.

militŝipoj ankritaj en Humen. Ankaŭ kamparanoj laborantaj en kampoj lanĉis spontaneajn atakojn kontraŭ la invadantoj.

La hontinda kapitulaco de Iŝan kaj la aliaj vekis grandan popolan indignon; amasaj malkontento kaj kolero fortiĝis rapide. Por subigi la esprimon de tiuj sentoj, Iŝan, Longven kaj Jang Fang, la tri altaj kapitulacistaj oficistoj, kune afiŝis strikte malpermesi al la popolo rezisti al la invadantoj kaj malpermesi kapti iun ajn malamikon surteriĝantan por rabi, deklarante, ke kiu ajn malobservis tiun ordonon, tiu devas esti punata laŭ milita leĝo. Ĉio ĉi tio plue malkovris la malbelan vizaĝon de la King-aj regantoj protekti la malamikon kaj subpremi la popolon.

Tamen, la popolo daŭrigis sian firman reziston, kaj furioza batalo ekflamis en Sanjuanli, vilaĝo ĉirkaŭ 2.5 kilometrojn for de la nordo de Kantono. La batalo de Kantono tuŝis la popolon de tiu ĉi vilaĝo senpere, kaj la kruelaĵoj de la invadantoj kaj la senhonta cedo de la King-aj oficistoj antaŭ longe jam furiozigis tiujn vilaĝanojn kaj la popolon ĉirkaŭ Sanjuanli. Kiam marodanta malamika unuo venis al la vilaĝo en la mateno de la 29-a de majo 1841, la lokaj popolanoj forte rezistis; sep — ok el la malamikoj estis mortigitaj kaj la ceteraj forkuris konfuzite.

En tiuj bataloj la popolo ĉiam eligis siajn proprajn ĉefojn. Legomkulturisto Vej Ŝaŭguang la unua elpaŝis kaj alvokis la tutan vilaĝanaron de Sanjuanli kuniĝi kaj prepari sin kontraŭ malamika venĝo. Kondukate de Vej kaj aliaj, la Sanjuanli-a popolo kunvenis antaŭ malnova templo ĉe la norda fino de tiu vilaĝo por fari ĵuron. Prenante tristelan flagon kiel sian standardon, ili ĵuris: “Ne timas morton kaj antaŭeniras, kiam la flago antaŭeniras, kaj retiriĝas, kiam ĝi retiriĝas.” Farinte preparojn, ili ĉiuj estis avidaj por batali ĝis la fino kontraŭ la malamiko.

Por mobilizi pli da popolanoj, la Sanjuanli-aj vilaĝanoj elektis Vej Ŝaŭguang kaj iujn aliajn kiel reprezentantojn por kontakti kun la najbaraj vilaĝoj. Ili rapide organizis grandajn armitajn trupojn formitajn el kamparanoj, teksaj metiistoj, ŝtonhakistoj, membroj de sekretaj socioj kaj iuj patriotaj sinjoroj el la urbetoj en la areo. Por fari efikan batalon al la malamiko, ĉiu vilaĝo sendis reprezentantojn al kunveno ĉe Niulangang por diskuti kiel organizi la amasojn kaj aranĝi ilin en batalo.

Niulangang, ĉirkaŭ 6 kilometrojn for de la nordo de Kantono, estis monteta regiono. En la posttagmezo de la 29-a de majo, la reprezentantoj de ĉiuj vilaĝoj kunvenis tie. Ĉe la kunveno estis konsentitaj: 1) Ĉiu vilaĝo formiĝu en sendependan unuon,

kun siaj elektita ĉefo kaj standardo. 2) Ĉiu vilaĝo preparu plurajn grandajn tamtamojn por doni alarmon, kaj unu vilaĝo batu siajn tamtamojn, ĉiuj aliaj venu al batalo. 3) Ĉiuj membroj en la aĝoj de 15 ĝis 50 venu al batalo. 4) En batalo, estu uzata la taktiko logi la malamikan forton profunden kaj koncentri forton por ĝin ĉirkaŭi kaj ekstermi, sed ne la fronta atako. 5) Niulangang estas la loko por la decidiga batalo. Post la kunveno, la reprezentantoj rapidis al siaj vilaĝoj kaj tiunokte tuj faris mobilizon por la granda batalo.

Frue en la mateno de la 30-a de majo, la popolanoj de la Sanjuanli-a areo, sub la flago de la Ping Jing Tuan (la Korpuso por Rebatu Briton), kolektis forton de kelkmiloj da homoj kaj marŝis al la Sifang-a Fortikaĵo, kie la britoj tendumis. La invadantoj estis matenmanĝantaj, kiam ili subite aŭdis fulmotondrajn batakrion kaj vidis la popolon kun lancoj, glavoj, ŝildoj kaj meĉopafiloj venantan de la montetoj kaj stepoj. Surprizite, Sir Hugh Gough, la generalisimo de la britaj teraj fortoj, rapide ordonis klarigoni al la kolektiĝo kaj poste dividis siajn fortojn en tri grupojn por obstrukci la atakantojn. Sin ekipante per musketoj kaj artilerio, ili nombris ne malpli ol 2,000 homojn, kiuj estis preskaŭ la tuta forto atakinta Kantonon.

Kiam Gough gvidis la invadantojn alkuregi de la altaĵoj, kie estis la fortikaĵo, la armitaj amasoj rapide retroiris por logi la malamikon profunden laŭplane. Atinginte Niulangang, la amasoj haltis kaj formiĝis en batalan vicaron sur la alta loko. Sentante danĝeron, la ruza Gough haste ordonis retiriĝon, sed jam estis malfrue. Subite kanono laŭte muĝis, tamtamoj kaj tamburoj estis batataj, kaj tie apenaŭ 8,000 armitaj vilaĝanoj, embuskantaj ĉirkaŭ Niulangang, subite eliĝis. La malamiko frapita en paniko rapide komencis bombardi la popolajn fortojn, sed neniel povis haltigi la antaŭenirantojn. Komenciĝis la kontraŭatako de la popolanoj de la Sanjuanli-a areo. Iu malamika majoro la unua perdis sian vivon. Gough tuj ordonis trarompi la ĉirkaŭadon en du vojoj por retiriĝi al la Sifang-a Fortikaĵo.

Kiam la britaj trupoj trarompis la ĉirkaŭadon, la popolaj fortoj tuj atakis iliajn alojn. Iu malamika kolonelo, priskribante la situacion en tiu tempo, konfesis: kiam la brita armeo retiriĝis en disigitaj kolonoj, la ĉinoj tuj koncentriĝis al ĝia malantaŭo kaj al la flankoj, firme kaj brave ĝenis ilin kaj proksimiĝis rekte al ili eĉ ĝis iliaj bajonetoj. La atakantoj uzis ĉiun ŝancon por komenci man-al-manan batalon, ekzemple, kiam la retiriĝantaj trupoj transiris

riveron aŭ marŝis en unuopa vico sur mallargaj vojetoj.

La furioze forkuranta malamiko estis embarasita de granda fulmotondro, kaj pluvego malsekigis ilian tutan pulvon kaj faris iliajn musketojn senutilaj. La verŝiganta pluvo subakvigis la vojetojn en la kampoj kaj tie ŝajnis vasta maro. La malamiko kun ledaj botoj sin trovis en tre malfacila irado sur la glitiga kaj kota tero, tamen la popolanoj de pli ol 100 vilaĝoj en la Sanjuanli-a areo, kun pajlaj pluvpelerinoj kaj plektitaj bambuĉapeloj, batalis pli kaj pli firme kaj kuraĝe. Ankaŭ la virinoj, maljunuloj kaj malfortuloj, kiuj komence estus devintaj evakui, venis al la batalo kun hojoj kaj sarkiloj en la mano. Eĉ la infanoj subtenis la kamparanajn batalantojn per batalekrioj. La virinoj, kiuj ne venis al batalo, preparis manĝaĵon en sia propra iniciativo kaj sendis ĝin al la fronto. Tiu memvola kunagado inter dekmiloj da popolanoj batalantaj kontraŭ la malamiko plene montris la potencon de la armitaj amasoj.

Persekutate de la batalantoj, iuj el la malamikoj sin kaŝis sub kukumaj aŭ legumenacaj subteniloj, iuj falis en la superakvajn kampojn, kaj iuj demetis siajn armilojn kaj levis manojn en cedo. La aroganta "tirano de la maro" perdis sian prestiĝon.

Ĉirkaŭ la 4-a horo post tagmezo, Gough kaj liaj forpelitaj trupoj atingis la Sifang-an Fortikaĵon. Ili trovis, ke malestis la 3-a Kompanio de la 37-a Regimento, kiu moviĝis en la malantaŭo. Taĉmento armita per la novaj armiloj, kontraŭakvaj prajmaj musketoj, estis sendita por savi ĝin. Fakte, la 3-a Kompanio estis ĉirkaŭita de la popolaj batalantoj dum la retiriĝo. Tiuj soldatoj kontraŭstaris ŝultro ĉe ŝultro en kvadrata formacio kaj retiriĝis paŝon post paŝo, opiniante, ke ili tiamaniere povis eviti sian ekstermiĝon. Sed por ili estis ne atendite, ke la heroaj ĉinoj elpensis la inĝenian metodon por trakti ilian obstinan reziston. La vilaĝaj batalantoj uzis lancojn kun hoko por fiŝi la malamikojn unu post alia el ilia formacio kaj poste senarmigis ilin.

Nur kun la helpo de la helptrupoj senditaj de Gough, tiu forpelita bando sukcesis trarompi la ĉirkaŭadon post la 9-a horo en la vespero. Sed la koleraĵaj batalantoj ĝin persekutis kaj ringo je ringo ĉirkaŭis la Sifang-an Fortikaĵon ĝis la mateno de la 31-a de majo.

Notindaj sukcesoj estis atingitaj en la batalo de la 30-a de majo. Laŭ tiutempaj registroj, pli ol 200 malamikaj soldatoj estis mortigitaj, ankoraŭ pli da estis vunditaj; pli ol dek estis kaptitaj kune kun granda kvanto da kaptita materialo.

La informo pri la granda venko en Sanjuanli rapide disvastiĝis tra ĉiuj vilaĝoj ĉirkaŭ Kantono. Ankaŭ popolanoj el malproksimaj vilaĝoj, kiuj ne aŭdis la informon, sin organizis en la 30-a de majo kaj atingis la Sifang-an Fortikaĵon tra la nokto. Ĉirkaŭ la 10-a horo antaŭ tagmezo de la sekvanta tago, la fortikaĵo estis sieĝata de pluraj dekmiloj da homoj, iliaj flagoj flirtis, iliaj glavoj kaj lancoj leviĝis kiel arbaro kaj iliaj batalekrioj resonadis ĉie. Antaŭ tiuj fortaj batalantoj, la invadantoj ne sciis kien sin turni.

En tiu decidiga momento de interdetenado, la plene armita King-a armeo, nombranta pli ol 8,000 fortajn soldatojn, retiriĝis el la urbo Kantono kun kunvolvita flagoj laŭ la kapitulaca konvencio de Kantono. Ili ŝajne ne vidis la dekmilojn da popoloj, kiuj ĉirkaŭis la invadantojn. La ĉirkaŭita malamiko sur la altaĵo de la Sifang-a Fortikaĵo sentis la sugeston, kaj Gough tuj skribis leteron, kiu estis ŝtele eligita de ĉina perfidulo tra la peza sieĝo, por peti helpon de Ju Baŭĉun, la prefekto de Kantono. Gough minacis, ke se King-registaro ne tuj disigis la amasajn fortojn, do la brita armeo konsideris, ke iliaj agoj estis oficiale sankciitaj, kaj nuligis la konvencion de Kantono, antaŭeniris por ataki la urbon kaj bruligis ĉiun ĝian najbaran urbeton kaj vilaĝon.

Leginte la timigan leteron de Gough, Iŝan, kiu de longe estis terurita de la invadantoj, tuj sendis Ju Baŭcun por helpi la ĉirkaŭitan malamikon.

Perfidulo Ju Baŭcun rapidis al la malamika tendejo por klarigi, ke King-registaro ne sciis la aktivecojn de la amasaj fortoj kaj ke certe ne estis King-oficioj inter ili. Por montri sian "lojalecon", li senhonte petis de la britoj sendi oficiron kiel akompananton en lia parolado kun la amasaj fortoj. Gough elektis kapitanon Moore, kiu iris kun blanka flago en sia mano kaj estis akompanata de interpretisto. Vidante, ke Ju Baŭcun kaj iu el la malamikoj alvenis ŝultro ĉe ŝultro, la kamparanaj batalantoj tre indignis. Ili celis Moore per siaj meĉopafiloj kaj malpermesis lin veni proksimen. Tiel li estis devigita ŝtele reiri.

Sciante, ke la indignantaj amasoj ne povis esti defiitaj, Ju Baŭcun tre pacige petis ilin retiriĝi. Sed, malamegante lin, la amasoj alvizaĝe denunciis lian senhontan perfidon al la patrujo. Iliaj koleraĵoj denuncoj fariĝis tumulto. Vidante la nesubpremeblan situacion, Ju Baŭcun sin turnis al la biensinjoroj por ke ili trovu iujn rimedojn por disigi la amasajn fortojn. Li minace diris al ili, ke tiu ĉi afero estis farata de ili kune kun la ordinaraj popolanoj kaj ke se la amaso ne disiĝos kaj io okazos, ili devos respondeci pri ĉio kaj la 6 milionoj da arĝentaj do-

laroj por reaĉeti la urbon ankaŭ devos esti pagitaj de ili. Instigite de la portempa indigno kaj dezirante protekti siajn proprajn familiojn kaj bienon, la sinjoroj partoprenis en tiu batalo kontraŭ la britaj invadantoj. Sed, apartenantaj al la bienula klaso, ili estis, fine, de la sama raso kiel King-burokrataro kaj nature ne povis kontraŭstari la oficistojn. Kiam Ju Baŭcun timigis ilin, ili ŝanceliĝis. Iuj glitis kaj aliaj eĉ helpis Ju per artifikoj persvadi la amasojn por ke ili disiĝu.

Post kiam la sieĝo de la Sifang-a Fortikaĵo ĉesis, la invadantoj ne kuraĝis longe resti en Kantono kaj silente retiriĝis el Humen en la sekvanta tago.

La amasoj estis portempe disigitaj, sed la flamoj de batalo estis ne estingitaj. Kiam, por konservi vizaĝon de la britoj, Charles Elliot eldonis proklamon en la 7-a de junio por ŝirmi la kruelan malvenkon suferitan de la invadantoj, la amasoj tuj elmetis malkonfeson kaj defiis ilin ĉe alia batalo. Tiam la malamiko jam sentis la forton de la amasoj kaj ne kuraĝis akcepti la defion.

La kontraŭbrita batalo en Sanjuanli estis unua spontanea batalo de la ĉina popolo kontraŭ fremda agreso en modernaj tempoj. Ĝi estis glora paĝo en la moderna historio de la nacia revolucia batalo de la ĉina popolo. Multe altigante la spiriton de la popolo kaj peze subpremante la arogantecon de la

fremdaj invadantoj, ĝi kuraĝigis la popolon de Guangdong kaj la tuta lando en ilia batalo kontraŭ agreso kaj vidigis ilin, ke la trupoj de la feŭda registaro ne estis fidindaj, kaj la malamiko ne estis timinda. Ĝi forte neis la argumenton de kompromistoj kaj kapitulacistoj, ke kun fortegaj militŝipoj kaj artilerio la invadantoj estis nevenkeblaj; ĝi montris, ke, post kiam la popolo estis armita, ili povis venki la invadantojn spite ilian superan ekipaĵon.

Iŝan kaj liaj kolegoj malvenkis kaj cedis al la invadantoj. Sed ili mensogis pri la batalo de Kantono en sia petskribo al la imperiestro Daŭguang, priskribante sian malvenkon kiel “grandan venkon”, pretendante, ke la reaĉeta prezo de 6 milionoj da arĝentaj dolaroj por Kantono estis pagita por debetoj de la komercistoj, kaj maskante la devigitan retiriĝon de la trupoj el Kantono per la diro subigi la banditojn en la kamparo. En la fino, ili petis de la imperiestro aprobi la rekomencon de komerco por la britoj. Kaj la imperiestro konkludis el la petskribo, ke lia registaro ne bezonis ĝeni iun ajn briton, kaj konsentis la rekomencon de komerco, rezonante pri tio, ke ili jam ricevis iujn punojn. Post tio, tiu ĉi aro da putraj aristokratoj de King-dinastio trompis aliajn, kaj eĉ

sin mem, skribante senskrupule sian “grandan venkon”.

Tamen, kiam King-registaro, opiniante la militon finita, ordonis la marbordajn defendajn fortojn retiriĝi, la britoj venis denove.

Kiam la brita registaro ricevis raporton de Charles Elliot pri la Konvencio de Ĉuanbi en aprilo 1841, ĝi estis tre malkontenta pri la eldevigo el Ĉinio. Tial, la brita registaro eksigis Elliot de ĉiuj liaj oficoj en Ĉinio, malkonfesis la konvencion kaj ekspedis Henry Pottinger, ruzan politikiston, kies rolo en koloniistaj aktivecoj en Hindio jam estis konata, kiel plenpovulon, por pligrandigi la skalon de la invado al Ĉinio por ke pli da rajtoj kaj interesoj povu esti akiritaj.

Kiam Pottinger atingis Aŭmen en la komenco de aŭgusto 1841, li sendis skizon pri la pacaj kondiĉoj al la Guangdong-provinca aŭtoritato. Li informis Iŝan, ke Elliot revenis al Britio kaj ke li mem estis aranĝita en la loko de Elliot, kaj minacis, ke se King-registaro ne akreditis plenpovulojn por akcepti la pacajn kondiĉojn en la tuto, liaj fortoj iris norden kaj atakis.

Antaŭ ol la skizo de kondiĉoj, ekspedita de Iŝan al Pekino, atingis la ĉefurbon, Pottinger jam ekiris norden kun ŝiparo kaj lanĉis surprizan atakon al Hiamen en la 26-a de aŭgusto. La garnizonaj komandoroj Giang Gijun kaj Ling Ĝi batalmortis, kaj

la insuleto Gulangju kaj la urbo Hiamen estis perditaj al la invadantoj.

Nur kiam la informo, ke Hiamen falis, atingis Pekinon, la imperiestro Daŭguang eksurpriziĝis el siaj stultaj sonĝoj pri paco. Li rapide ordonis la marbordajn provincojn fortigi siajn defendojn, sed tiam la brita ŝiparo jam atingis la marbordon de Ĝe-giang. En la 25-a de septembro, la britaj invadantoj atakis Dinghaj. La defendantoj, 5,000 en nombro, komandataj de Ge Junfej, Ĝeng Guohong kaj Vang Hipeng, faris firman reziston kontraŭ la malamiko, batalante ĝis la lasta homo. Post ses tagnoktoj da furioza batalo, en la 1-a de oktobro, Dinghaj falis en malamikajn manojn refoje. La ĉinaj trupoj elmontris grandan bravecon en la batalo, kaj multaj el la invadantoj mortis kaj vundiĝis.

Poste, la britaj trupoj atakis Ĝenhaj. Ju Bujun, la garnizona komandoro ĉe Ĝaŭbaŭŝan ekster la urbo, estis timulo. Apenaŭ la malamiko surteriĝis, li konfuzite forkuris. Tiam Jukian, imperia komisararo kaj generalgubernatoro de la provincoj Giang-su, Anhuj kaj Gianghi, faris komandon, sed malfortiĝis kaj sin mortigis per sinĵeto en riveron. Ĝenhaj estis perdita en la 10-a de oktobro. Post tri tagoj, la malamiko atakis kaj kaptis Ningbo. Kvankam la spirito de la ĉinaj trupoj en la batalo de Ĝenhaj estis iom influata de la forkuro de Ju Bujun, tamen multe

da soldatoj spontanee faris elstaran kaj man-almanan batalon kontraŭ la invadantoj.

Okupinte Ningbo, la invadantoj nomis kiel lokan ĉefon Charles Gutzlaff, kiu estis grava agento sub la kostumo de kleriko kaj partoprenis en la ekspedicio de la *Lord Amherst* (vidu ĉapitron 4). Ili rabis la urbon, la riĉan komercan centron en Ĝegiang-provinco, forportante monerojn kaj ingotojn kun valoro de ĉirkaŭ 120,000 dolaroj el la provinca trezorejo en Ningbo kaj multe da greno sufiĉa por ilia dujara sinprovizado.

La Ĝegiang-a kampanjo plimalbonigis la situation. King-registaro perdis armeojn kaj urbojn, kaj iliaj tagoj restis kalkuleblaj. Batalo estis necesa. En la 18-a de oktobro, la imperiestro donis al sia nevo Iging la titolon de “Majesta Generalo”, kun Venvej kaj Tejiŝun kiel liaj konsilantoj, kaj nomis Niu Gian kiel generalgubernatoron de la provincoj Giangsu, Anhuj kaj Gianghi. Ili transigis trupojn el la interna lando al Ĝegiang por la milita afero.

Kiel Iŝan, Iging reprezentis la putrajn fortojn de dekadencia feŭda regado, kaj li iris preskaŭ la saman vojon de malvenkismo kaj kapitulacismo, kiun Iŝan iris. Dum sia vojaĝo al Ĝegiang en akompanado de multaj liaj princoj kaj amikoj kaj karavano rekomendita de princoj kaj ministroj, li pasigis sian tempon en vidindaĵoj kaj diboĉo. Li konsumis

pli ol monaton en Suĝoŭ, fanfaronante sian forton, sed ne faris preparon por rehavigi la perditan teritorion. Iuj proponis organizi lokajn fortojn kaj disigi ilin ĉirkaŭ Ningbo, Ĝenhaj kaj Dinghaj por ke ili en malgrandaj kontingentoj ĝenu la malamikon ie ajn je iu ajn tempo, kaj je la oportuna momento, kiam la malamiko estis sufiĉe laca, la regulaj trupoj faru kontraŭatakon. Sed Iging, kiel Iŝan, timis la popolon kaj nature ne povis alpreni planon, kiu bezonis popolan subtenon.

Iun tagon en januaro 1842, Iging songĝis, ke la britoj forkuris per ŝipoj al la publika maro. Liaj akompanantoj ĉiuj diris, ke tio estis “bona aŭguro”. Ankaŭ Venvej pretendis, ke li havis la saman songĝon. Iging plezuriĝis kaj decidis tuj rekomenci sian ekspedicion. Sed, atinginte Ŝaŭhing de Ĝegiang, tiuj nobeloj kaj princoj fariĝis ebriaj ĉiutage je la fama loka vino kaj revis pri la venko en la songo.

En la 10-a de marto, Iging dividis siajn trupojn en tri grupojn, intencante rehavigi Ningbo, Ĝenhaj kaj Dinghaj samtempe. Li estis certa pri sukceso, kalkulante pri kunagado el interno de la tri urboj. Li ordonis siajn trupojn sin armi ne per pafiloj, sed per lancoj kaj glavoj. La britaj invadantoj informiĝis pri la plano de Iging antaŭe kaj estis preparitaj. Kiam la trupoj senditaj por kapti Ningbo eniris en la urbon, ili trafis la pafadon de la britoj el la domoj ĉe

ambaŭ flankoj de strato. Ili konfuze retiriĝis kun peza perdo. Ankaŭ la aliaj du grupoj de Iging-aj trupoj estis malvenkitaj kaŭze de malbona komando. Kaptante la ŝancon, la malamiko okupis Cihi; Iging kaj liaj membroj forkuris al Hangĝoŭ. Timante pluan batalon, li favoris kompromison ekde tiam. Tiamaniere la batalo en Ĝegiang finiĝis, Iging, kiel Iŝan, iris tra tri stadioj de konduto — malprudenta ago, paniko ĉe la unua renkontiĝo kun la malamiko kaj malkuraĝa kapitulaco.

La bataloj de Kantono kaj Ĝegiang, komandataj respektive de Iŝan kaj Iging, estis la plej grandaj bataloj kondukataj de King-registaro en la Opia Milito. Ĉirkaŭ 20,000 soldatoj partoprenis en ĉiu batalo, sed ĉiu batalo perdiĝis pro blinda, konfuza kaj erarega komando. Tamen la radika kaŭzo de la malvenkoj estis la akra antagonismo inter la dekadencaj feŭdaj regantoj kaj la popolo. La reganta klaso ne nur ne kuraĝis organizi la popolon por rezisti, sed ankaŭ alprenis malamikan sintenon kontraŭ ili. Kaj kiam la popolo spontanee leviĝis kontraŭ la invadantoj, ĝi limigis kaj sabotis ilian batalon, eĉ fabrikis akuzon de nacia perfido kontraŭ la rezistantoj. Ĉio ĉi tio decidis ĝian absolutan malvenkon. Se la King-a Kortego ne estus tiel putra, ĝi povus subpremi la invadantojn, kiuj venis de malproksima hejmlando

kun forto de ne pli ol 15,000 homoj kaj de sume 100 diferencaj ŝipoj.

La putreco kaj malforteco de King-registaro malkaŝitaj de ĝiaj ripetaj malvenkoj elvokis grandan popolan indignon. Alta elspezo en la milito kaj milit-profito de oficistoj kune pliigis la popolan ŝarĝon. La sendisciplinemo de la King-a armeo, eltordo kaj turmento de ĝiaj trupoj pligravigis la suferon de la popolo. Ĉio ĉi tio kaŭzis popolan maltrankvilon, plendoj aŭdiĝis ĉie kaj la kontraŭdiroj inter la feŭdaj regantoj kaj la popolo plie akriĝis. Rifuzoj de terrento kaj aliaj malgrandskalaj kamparanaj bataloj okazis tra la tuta lando. En la komenco de 1842, sekreta asocia leviĝo kondukata de Ĝong Ĵengie eksplodis en la Ĉongjang-a regiono de Hubej-provinco. Kvankam la leviĝo estis subpremita, tamen ĝi multe skuis la King-an reĝimon, realigante al ĝi, ke se la fremda milito ne finiĝis frue kaj hejmaj ĝenoj ekaperis, la situacio ĉiam pli furioziĝis. Ĉe tiu kriza momento, Liu Junke, estro de Ĝegiang-provinco, pet-skribis al la imperiestro Daŭguang pri “10 punktoj por konsidero”, konsilante al la imperiestro kompromisi kun la agresantoj kiel eble plej frue. Akcentante la nestabilan enlandan situacion, li rememorigis la imperiestron, ke se la milito daŭrus, la popolo probable farus ribelon, kaptante la ŝancon. Ankaŭ

aliaj oficistoj, kiuj favoris kompromison, pledis por finigo de la milito per traktado en tiu tempo.

La disvolviĝo de la popola batalo senpere minacis la regadon de la bienula klaso, kaj permesi komerci kun la britaj invadantoj, pagi la kompenzon kaj cedi teritorion al ili ne povis serioze endanĝerigi ĝian regadon portempe. Tial, King-registaro preferis fini la militon, fari cedon al fremdaj invadantoj kaj serĉi pacan intertraktadon. Post malvenko de Iging en Ĝegiang, la imperiestro Daŭguang donis ordonon malpermesi kontraŭstaron al la brita armeo aŭ kaptonton de ĝiaj soldatoj. Li eĉ dekretis, ke kiu ajn mortigis eĉ simplan malamikan soldaton, ne nur tiu devas esti punata, sed ankaŭ la prirespondaj oficistoj devas esti juĝataj. Samtempe la imperiestro sendis Kijing, manĉuran nobelon kaj estron de Ŝengging en la Nordoriento, kaj Ilibu, generalgubernatoron de la provincoj Giangsu, Anhuj kaj Gianghi, eksigitan pro kompromiso kun la atakantoj, al Ĝegiang por trakti kun la britaj invadantoj.

Kiam Kijing kaj Ilibu atingis Ĝegiang-provincon, ili skribis al la invadantoj, petante militĉesigon kaj pacan intertraktadon. Por flati la invadantojn, ili unuflanke liberigis la britajn kaptitojn. Sed Pottinger ne volis trakti kun ili en tiu tempo. Li informigis de klerikoj pri tio, ke King-registaro fortigis sian defendon en la nordo ĉirkaŭ Dagu de Tiangin,

sed forlasis defendon de la malsupra baseno de Jangzi-rivero. Li sciis, ke tie estis la riĉa regiono de Ĉinio kaj ke Nankino, estante ŝlosila haveno por Jangzi-rivero kaj la Granda Kanalo, estis grava loko por la King-a reĝimo. Grandkvanto da greno kaj arĝento, kolektita sude de Jangzi-rivero, unue amasiĝis en Nankino kaj poste perŝipiĝis laŭ la Granda Kanalo, tra Ĝengiang al Pekino. Pottinger kredis, ke kapto de Nankino fare de lia armeo signifis strangoli King-registaron, alporti al ĝi plipezan minacon kaj povi devigi ĝin akcepti ĉiujn liajn postulojn senkondiĉe. Tial, li reĵetis la pacajn proponojn de Kijing kaj Ilibu kaj decidis entrudiĝi en Jangzi-riveron, detranĉi la Grandan Kanalon kaj tiel kapti Nankinon.

En la komenco de majo 1842, la invadantoj retiriĝis el Ningbo kaj Ĝenhaj kaj, prenante Ĝouŝan-insularon kiel sian bazon, en la 18-a, okupis Ĝapu, gravan marbordan urbon en Ĝegiang. Poste ili komencis invadi Jangzi-riveron.

Vusong, situanta ĉe la buŝo de Jangzi-rivero, estas la pordo de tiu granda rivero. Laŭlonge de Huangpu-rivero estis serio da fortikaĵoj. Antaŭ la brita atako, la fortikaĵoj sur la okcidenta flanko ĉe Vusong estis garditaj de trupoj sub Ĉen Huaĉeng, arma komandoro de la provincoj Giangsu kaj Anhuj, kiu estis preskaŭ 70-jara, kaj tiuj ĉe Baŭŝan de la pli ol 3,000 soldatoj sub Niu Gian, generalguber-

natoro de la provincoj Giangsu, Anhuj kaj Gianghi. Kiam la brita armeo atakis en la 16-a de junio, komandoro Ĉen heroe rezistis. Spite de la densa malamika pafado, li okupis sian pozicion sur alta loko kaj ordonis siajn trupojn repeli la malamikon per kanonado. Furioza batalo daŭris pli ol du horojn, iuj el la britaj ŝipoj estis difektitaj, kaj la malamiko ne sukcesis surteriĝi dum sia fronta atako. La ruzaj invadantoj tiam penis perforte surteriĝi, veturante per malgrandaj ŝipoj en rivereton por ataki la flankon de la okcidentaj fortikaĵoj de la malantaŭo de Vusong. Tiu plano estis ankaŭ malhelpita de la firma rezisto de la garnizonaj trupoj. Sciiĝinte, ke la trupoj de Ĉen difektis iujn britajn ŝipojn, Niu Gian kondukis helptrupojn de Baŭŝan al Vusong. Tamen, sur la batalkampo tiu putra burokrato kondutis kvazaŭ li revuis sian gardon de honoro. Kiam la malamiko trovis tion, ili ekpafis per kanonoj. Aŭdinte la pafon, Niu Gian eskapis el sia portseĝo, perdinte sian ĉapon kaj botojn, kaj kuregis internen de siaj soldatoj por sin kaŝi. La invadantoj, kaptante la ŝancon, surteriĝis kaj faris frontan atakon kontraŭ la okcidentaj fortikaĵoj. Komandoro Ĉen kaj liaj soldatoj brave batalis per lancoj en man-al-mana batalo kaj elmontris sian grandan bataleman spiriton. Li daŭrigis batalon malgraŭ multaj vundoj kaj finfine estis mortigita. La okcidentaj fortikaĵoj falis

sub atako de ĉiuj flankoj. La orientaj fortikaĵoj estis perditaj ĉe la sama tempo, kaj tiel la invadantoj okupis Baŭŝan kaj Ŝanhajon.

Ili regis Ŝanhajon kvin tagojn. Ili ne nur eltor-dis el la popolo 500,000 arĝentajn dolarojn kiel reaĉetan prezon por la urbo, sed ankaŭ senskrupule rabis tie kaj ĉirkaŭe. Ili forprenis multe da delikataj ornamaj objektoj el interno de la Urba Templo kaj bruligis ilin. Ili rabis la lombardejojn. Tiam estis frua somero, kaj ĉiuj britaj soldatoj drinkis kaj orgiis kun brodita ventumilo en la mano sur la stratoj, portante silkajn aŭ atlasajn paltojn garnitajn per multkosta pelto. Tio ja estis la fanfaronita “okcidenta civiliza-cio” de la imperiismaj rabistoj!

En la fino de junio, la britaj helptrupoj atingis Vusong, kaj en la komenco de julio, ili ekveturis supren laŭ Jangzi-rivero.

Jangzi-estuario estas vasta, ĉar ĝi estas proksime al la maro, kaj laŭlonge de la malsupra baseno ĝiaj bordoj parte pleniĝis per ŝlimo, dum ĝia fluejo estis punktata per sablaĵoj, kio faris la akvajn vojojn serpentaj, kaj la rivero provizis bonajn naturajn defend-aĵojn per sia etendo. Sed, post la malvenko en Ĝe-giang King-registaro, sekvante politikon de kompro-miso kaj kapitulaco, tute ne fortigis la defend-aĵojn laŭlonge de la bordoj supre de Vusong. Post kiam Niu Gian forkuris el Baŭŝan al Nankino, li ĉiam pli

timis la malamikajn militŝipojn kaj armilojn kaj rigardis ilin kiel nesubigeblajn per sole militaj rimedoj. Li ne nur senhonte malpermesis la trupojn postenigitajn en la urboj kaj gubernioj ĉe la rivero pafi kontraŭ la invadantojn, sed ankaŭ ordonis, ke ili devis prezenti al la britoj bovon, ŝafon, vinon kaj alian nutraĵon. Tiamaniere la malamiko povis sendi malgrandajn ŝipojn por mezuri la akvajn vojojn kaj daŭrigi sian okcidentan antaŭeniron laŭ la rivero.

En la 15-a de julio, la brita ŝiparo atingis la riveran havenon de Ĝengiang.

Ĝengiang, prospera komerca urbo de 100,000 familioj kaj kun bonaj naturaj defendadoj kaj sufiĉe da homfortoj, certe povus esti tenata kaj povus esti blokanta la malamikan ofensivon kontraŭ Nankino. Tamen, vere malforta estis ĝia garnizono, konsistanta nur el pli ol 1,000 soldatoj de la Garnizonaj Standardaj Trupoj kaj apenaŭ 2,000 soldatoj de aliaj provincoj, kiuj estis postenigitaj ĉe la rando. En la 21-a, sume 7,000 britaj soldatoj surteriĝis kaj okupis ĉiujn poziciojn ekster la urbo. Tiam ili koncentris siajn fortojn por ataki la urbon. Ili dinamitis la okcidentan pordon de la urbo kaj uzis grimp-ŝtupetarojn por trapasi la murojn. La garnizono brave rezistis. Kiel iu brita oficiro skribis en siaj rememoroj, "Plej obstina rezisto estis farita de la manĉuroj ĉe tiu punkto; ili batalis pro ĉiu colo da tero, tial ĉiu angulo kaj

ĉiu embrazuro estis konkeritaj per bajoneto . . .” “La rezistantoj kuregis kontraŭ la britajn bajonetojn aŭ kelkfoje saltis al brita gardstaranto, kaptis lin kaj saltis trans la urban muron, ĉirkaŭpreninte lin forte. Unu aŭ du fojojn brita soldato estis ĵetita trans la urban muron antaŭ ol li uzis sian bajoneton al sia atakanto.”

La heroa defendo de Ĝengiang donis al la invadantoj pezan frapon, kaj ili kruele venĝis al la popolo de la urbo per sovaĝa rabado, bruligo kaj mortigo. Denuncante la kruelecon de la britoj, Engels alte laŭdis la bataleman spiriton de ĉinaj defendantoj. Li skribis: “**. . . Kiel ajn mankaj la manĉur-ĉinaj soldatoj estis en milita lerteco, ili ne estis mankaj en kuraĝo kaj spirito. Tiuj manĉuroj, kiuj estis nur mil kvin-cent en nombro, batalis kun la pleja riskemo, kaj estis mortigitaj ĝis unu homo . . .** La generalisimo, vidante, ke la tago estis perdita, ekbruligis sian domon kaj pereis en la flamoj. La angloj perdis cent okdek kvin homojn en la atako — perdo, kion ili venĝis per la plej kruela rabo en la urbo — la milito estis kondukita de la angloj en spirito de besta krueleco, kiu estis konvena duplikato al la spirito de kontrabanda avideco, estigita en la milito. Se la invadantoj renkontiĝus kun simila rezisto ĉie, ili neniam atingus Nankinon.”*

* Frederick Engels, “La Nova Brita Ekspedicio en Ĉinio”, aprilo 1857.

Spite la falon de Ĝengiang, la movado de la ĉina popolo por rezisti kontraŭ la brita agreso daŭre disvolviĝis. Dume, grandnombro da britaj soldatoj mortis de ĥolero, la malamikoj preskaŭ perdis batalpovon. Iu el la invadantoj poste rememoris: “. . . Antaŭ ol semajno pasis, pli ol kvardek soldatoj en la 98-a Regimento jam pereis de ĥolero.” Efektive, estis multaj malsanaj soldatoj sur ĉiuj malamikaj ŝipoj, ĉiuj militŝipoj aŭ provizaj ŝipoj, kaj por la britoj estis tiel malsufiĉaj la homfortoj, ke iuj el iliaj ŝipoj forlasis sian mision. Li diris, ke sur iu brita proviza ŝipo, ĉiuj mortis de plago, escepte de tri maristoj kaj unu kelnero. En tiu favora situacio, se King-registaro rezistus firme aŭ efikigus blokadon de manĝaĵprovizo al la britoj, la malamiko neniam povus atingi Nankinon. Sed pro la enlanda politiko de malamikeco al la popolo kaj la fremda politiko de kompromiso kaj kapitulaco al la invadantoj, kvankam la popolo, soldatoj kaj iuj komandoroj heroe batalis kaj ekzistis vere favora situacio, la putra King-registaro ne povis savi malvenkon de la milito.

*Popolaj Kontraŭbritaj Bataloj en Fugian,
Ĝegiang kaj Malsupra Jangzi-valo*

7

Kien ajn la britaj invadantoj iris, ili ĉiam renkontiĝis kun rezisto de la ĉina popolo. Kiel samlandanoj de Guangdong, la popolanoj de Fugian, Ĝegiang kaj la malsupra Jangzi-valo elmontris grandan spiriton en sia rezisto kontraŭ agreso.

En aŭgusto 1841, kiam la britaj trupoj, atakante kaj okupante Hiamen, ĉie rabis, vilaĝano kun familia nomo Ĉen organizis forton de pli ol 500 por rezisti ilin. Tio devigis la invadantojn ne kuraĝi longe okupi Hiamen, kaj tial ili retiriĝis al la insulo Gulangju.

Kiam la britoj atakis Ĝenhaj, en Ĝegiang, la lokaj popolanoj spontanee organiziĝis kaj faris blokadon por defendi la marbordon. Ili rebatis malamikan rekognoskan ŝipon, vundis kaj kaptis oficiron kaj

nombron da liaj membroj, kiuj kuraĝis surteriĝi kaj rabi.

Post la okupo de Ĝenhaj kaj Ningbo fare de la britoj, Hju Baŭ, Ĝang Tajhuo kaj Ŝeng Dacaj organizis la Hej Ŝuj Dang (Nigran Akvan Partion) por ĝeni la malamikon. Ĝiaj membroj sin kaŝis en kaj ekster la urbo Ningbo, kun multaj rapidaj ok-remilaj boatoj, preparitaj por fari noktajn surprizajn atakojn kontraŭ la malamiko, kiuj kreis vere streĉitan atmosferon inter la invadantoj en nokto. Tiu estis nur unu el multaj famaj popolaj fortoj. Fakte, ĉie en la Ĝenhaj-a kaj Ningbo-a regionoj la popolo sin armis propravole por la batalo. La spontanea popola rezisto en Ĝegiang kaŭzis al la invadantoj grandajn embarasojn, kion iliaj propraj registroj ofte malkaŝis. Ekzemple, en la 18-a de februaro 1842, brita transportŝipo aliĝis al la bordo por preni akvon, ĉar la tajdo estis refluenta, ĝia kapitano estis saĝe kaptita kaj punita de la lokaj popolanoj. Laŭ la propraj registroj de la invadantoj, en la lasta periodo de ilia okupado de Ningbo, 42 invadantoj estis kaptitaj de ĉinaj popolanoj en diversaj manieroj.

Kiam la britoj atakis Jangzi, la popolanoj vivantaj ĉe ĝiaj bordoj komencis similan batalon kontraŭ ili.

La britoj okupis Vusong, Baŭŝan kaj Sanhajon, kaj intencis antaŭeniri laŭ Suĝoŭ-rivero por okupi

la urbon Suĝoŭ. Kun tri ŝipoj, ili devigis fiŝkaptiston Vang Zajkun servi kiel ilia voĝvidanto. Li lerte logis ilin en la malprofundaĵon, kvankam tie ili havis ŝipojn por malprofunda enakviĝo, tamen iliaj ŝipoj grundis kaj ili devigite forlasis sian planon por ataki Suĝoŭ.

Ĉirkaŭ la falo de Ĝengiang, la popolanoj vivantaj ĉe la malsupra Jangzi uzis fajrajn flosojn en nokto, kiam tie estis favora vento por haltigi la antaŭeniron de la brita ŝiparo. En la 19-a de julio 1842, du tagojn antaŭ ol la britaj trupoj atakis Ĝengiang, la britaj mara kaj tera armeoj kune proklamis, per minacaj vortoj, malpermeson de la uzo de tiuj fajraj flosoj. El tio pruviĝis, ke ili timis tiajn atakojn.

La salaj laboristoj, kiuj estis ŝipaj loĝantoj en la norda bordo de Jangzi ĉe Guaĝoŭ kaj Jiĝeng, formis gravan rezistan forton. Antaŭ la entrudiĝo de la britoj en Jangzi-valon, iuj bienuloj, kiuj favoris reziston, skribis al King-registaro kun propono varbi la salajn laboristojn por batali kontraŭ la invadantoj. Ili opiniis, ke tio povis kaj fortigi la defendojn de Jangzi kaj venigi la salajn laboristojn sub subjugiĝon, por ke la lastaj ne uzu la ŝancon por endanĝerigi ilian regadon. La regantoj de King-dinastio ĉiam estis malamikaj al la salaj laboristoj. Post la brita invado de Jangzi-valo ili ofte avertis,

ke la salaj laboristoj devis esti antaŭgarditaj, kaj kalumniis, ke ili povus fariĝi kunlaborantoj de la malamiko por endanĝerigi ilian reĝimon. Fakte, tuj post kiam la britaj trupoj proksimiĝis al Ĝengiang, la salaj laboristoj leviĝis amase por rezisti ilin, tio refutis la kalumniojn de la bienula klaso. Sed la reganta klaso opiniis, ke memvola rezisto de la salaj laboristoj estis danĝera. En la 18-a de julio, la perfidulo Jan Ĉongli, sala egkomercisto, portis grand-nombron da "donacoj" al brita militŝipo ankrita en la rivero apud lia hejmurbo Jiĝeng. Li senhonte donis al ili 500,000 arĝentajn dolarojn en repago por ilia retiriĝo el la urbo Jangĝoŭ. Li ankaŭ informis ilin, ke la salaj laboristoj estis kontraŭbrita forto kaj ne estis direktataj de King-registaro. Pro lia instigo la britaj trupoj lanĉis surprizan noktan atakon, bombardante la loĝejon de la salaj laboristoj ĉe Laŭhejing. Flamoj lumigis la tutan ĉielon, alportante katastrofon al miloj da salaj laboristoj. Tio estis sanga krimo faracita de enlandaj kaj fremdaj reakciuloj, kiuj koluziis por buĉi la ĉinan popolon.

La popolo en la Ĝengiang-a regiono alprenis la taktikon de nokta atako por daŭrigi konstantan ĝenadon al la britaj invadantoj. Iu brita oficiro rememoris pri la okupado de Ĝengiang: "Dum la nokto ni estis ĉiam alarmataj de malgrandaj apartaj partoj de la malamiko, antaŭenirantaj al kaj pafan-

taj kontraŭ nia tendaro; tio precipe turmentis la trupojn, ĉar ili devis ofte prepari por rezisti atakon kaj ne havis ian ajn ripozon.” La “malamiko” aludita en tiu ĉi cito, fakte, ne estis “malgrandaj apartaj partoj” de ĉinaj trupoj, sed estis la popolamasoj, kiuj sentis profundan malamon al la invadantoj kaj spontanee leviĝis kontraŭ ili. Tiu speco de turmentado fare de la popolo certe formis la plej grandan problemon por la invadantoj.

La popolanoj de Ginggiang norde de Jangzi sin organizis por severe puni la malamajn invadantojn. En la 14-a de aŭgusto, kiam iuj invadantoj venis al Ginggiang por rabi kaj eltordi provizaĵojn, la lokaj popolanoj kriegis: “La fremdaj diabloj venas”, kaj ili rezistis kaj ŝtonumis de la urba muro iujn entrudiĝantojn, kiuj venis por rekognosko. Ankaŭ la popolanoj ĉirkaŭ la urbo atakis la malamikon, kaj la lasta estis devigita forkuri.

Tiunokte, por prepari kontraŭ malamika venĝo, la popolanoj de Ginggiang kaj la garnizonaj trupoj kune organizis defendan forton de ĉirkaŭ 1,000 homoj, akrigante bambuajn pintaĵojn kiel armilojn, riparante pafilojn kaj elfosante la kanonojn enterigitajn laŭlonge de la riveraj bordoj sub la ordono de Niu Gian, kiu retiriĝis post la entrudiĝo de britoj en la Jangzi-regionon. Ili defendis la riveran digon por ataki la malamikon. En la sekvanta tago, estis

atendite, ke tri britaj ŝipoj alvenis por sin venĝi. La popolanoj de la tuta urbo kuraĝe leviĝis kaj reatakis ilin. La invadantoj ne kuraĝis ataki Ginggiang plu.

En la norda kaj la suda bordoj de Jangzi-valo, la rezista movado de la popolo vaste kaj rapide disvolviĝis. Linking, generalgubernatoro de Rivera Administrejo, skribis al la imperiestro, ke en la distriktoj laŭlonge de Jangzi-rivero kaj la subdistriktoj laŭlonge de la Granda Kanalo en nordo de Giangsu, estis volontulaj fortoj nombrantaj pli ol 90,000 homojn kaj subtenataj en financkontribuo de la sinjoraro kaj la popolo; multe da popolanoj ankaŭ donacis latunon kaj feron por fari kanonojn. Dume, pli ol 1,700 rekrutoj estis varbitaj en la provinca urbo Suĝoŭ. De junio ĝis aŭgusto 1842, kiam la malamiko penetriĝis, la popola forto ŝvelis ĝis pli ol 100,000 homoj laŭlonge de ambaŭ bordoj de Jangzi-valo. Tio indikis la fortan ŝveladon de la rezista movado de la popolo.

La fortega batalo de la ĉina popolo kontraŭ la invadantoj elmontris ilian sentiman spiriton kaj ilian firmecon por neniam cedi al imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

Post la malvenko en Ĝegiang, la reganta kliko de King-dinastio jam intencis cedi. Kiam Ĝengiang falis en la manojn de la britaj invadantoj, ĝi ĉiam pli deziris peti pacon pro du kialoj. Unue, ĝi estis timigita de la brita invado en la malsupran Jangzivalon, kio tranĉis komunikojn inter la nordo kaj la sudo. Due, se la milito kontraŭ la ekstera malamiko ne finiĝus rapide, la King-a reĝimo ne povus disponi necesajn fortojn por subpremi la proksimegan popolan ribelon.

En la 6-a de aŭgusto 1842, 70—80 britaj militŝipoj veturis al Nankino unu post alia. Niu Gian provis aranĝi cedon. Sed la brita plenpovulo Henry Pottinger rifuzis paroli kun li, dirante, ke Niu ne estis plenpovulo kaj ne havis aŭtoritaton por intertrakti. Pottinger ankaŭ minacis, ke li komencus

kanoni Nankinon, se King-registaro ne sendus plenpovulon por intertrakti. Multe timigita Niu Gian tuj sendis urĝan raporton al imperia komisaro Kijing, kiu estis tiam en Vuhi, urĝigante lin tuj veni al Nankino. En la 10-a de aŭgusto, la britoj plue deklaris, ke se plenpovulo de King-registaro ne donis sian legitimacion antaŭ la tagiĝo de la sekvanta tago, ili bombardis la urbon en la mateno. Ilibu kaj Niu Gian rapidege avizis la britojn, ke imperia komisaro Kijing baldaŭ alvenis portante la imperian edikton de “eterna akordiĝo”, kaj ankaŭ montris la reskripton de la imperiestro Daŭguang por peti pacon. La invadantoj intence parolis pri atako al la urbo por minaci kapitulacistojn kiel Kijing, Ilibu kaj Niu Gian por ke ili tuj kaj senkondiĉe akceptu iliajn postulojn. La britoj ŝajnis teruraj, sed fakte ili estis tute malfortaj. Epidemio de ĥolero kaŭzis grandan mortadon inter ilia malgranda forto de 7,000 — 8,000, kaj multaj ankoraŭ estis malsanaj. La invadantoj mem taksis, ke nur 3,400 homoj estis taŭgaj por batalo, dum estis 8,000 ĉinaj soldatoj por defendi Nankinon. Se la defendantoj absolute firme rezistus la malamikon, ili tute povus subpremi ĝin.

Vidante, ke siaj minacoj produktis rezultojn, la britoj ŝanĝis sian tonon. Ili diris, ke britoj venis nur por komerci kun Ĉinio, kaj nenial ili kuraĝis ofendi Ĉinion; ke la milito, kiu daŭris, estis afero

kontraŭ ilia volo; kaj ke ĉar imperiaj komisaroj havis rajton fari decidojn, ankaŭ ili estis pretaj kaj volontaj por intertrakti.

En la sekvanta tago (11-a de aŭgusto), Kijing haste atingis Nankinon kaj penis kontakti la malamikon pri la kondiĉoj de cedo. Por plue timigi Kijing, Ilibu kaj Niu Gian kaj igi ilin akcepti la britajn postulojn tute, Pottinger invitis ilin al sia flagŝipo por montri la ŝipan artilerion. Tiu manovro estis vere efika; Kijing poste raportis al la imperiestro Daŭguang, ke la fremdaj ŝipoj estis fortaj kaj iliaj kanonoj potencaj. Li diris, ke li antaŭe sciis laŭ onidiro, sed nun vidis per siaj propraj okuloj kaj li poste konvinkis, ke la britoj ne povis esti subigitaj per forto. Tio plene malkaŝis la malkuraĝon de la oficistoj de King-dinastio antaŭ la malamikaj kano-

noj.

En la okuloj de la King-a reganta klaso, la invadantoj estis tiel timindaj, ke la sola eliro estis cedi senkondiĉe. En la 22-a de aŭgusto, la imperiestro donis reskripton por akcepti ĉiujn britajn postulojn. En la 29-a de aŭgusto, Kijing, Ilibu kaj Niu Gian suriris la britan militŝipon *Cornwallis* ankritan ĉe Nankino, subskribis la Nankinan Traktaton, la unuan neegalan traktaton en la moderna historio de Ĉinio, kaj tiamaniere forvendis la rajtojn de la ĉina nacio.

Kvankam la Nankina Traktato estis subskribita, multaj gravaj problemoj, kiel doganaj tarifoj, konsula jurisdikcio kaj la unuflankeca traktado de la plej favorata nacio, ankoraŭ ne estis deciditaj. Tial, ĉina-brita intertraktado daŭris en Guangdong. En la 22-a de julio 1843, "Ĝenerala Regularo de la Malfermo de Kvin Havenoj por Komerco" estis publikigita kaj efektivigita, kaj la subskribo de la Humen-a Traktato sekvis en la 8-a de oktobro. Tiuj du dokumentoj estis suplemento por la Nankina Traktato.

Laŭ la Nankina Traktato kaj ĝiaj suplementaj traktatoj, Britio akiris jenajn gravajn rajtojn kaj privilegiojn:

- 1) La perforta okupado de Hongkongo. Jam frue en 1830, 47 britaj komercistoj en Ĉinio skribis leteron al Parlamento en Londono, petante, ke la brita registaro okupu iun insulon ĉe la ĉina marbordo por "protekti" britan komercon (efektive la opian komercon). William John Napier, la unua advokato por kapto de Hongkongo, pensis, ke tiu insulo povis sin turni en komercan havenon kaj militŝipan bazon por ilia penetriĝo en Ĉinion. Tiu ĉi malica intenco finfine realiĝis tra la Cuanbi-a Konvencio subskribita de Charles Elliot kaj Kiŝan en 1841. Ses tagojn poste, la britaj invadantoj perforte okupis Hongkongon. Poste la brita registaro malkonfesis la Cuanbi-an dokumenton, sed la inva-

dantoj neniam redonis Hongkongon al Ĉinio. Kaj en la Nankina Traktato ilia okupado de la insulo estis enlistigita kiel pli grava detalo.

2) La eltordo de grandaj kompensoj. La Nankina Traktato kondiĉis, ke Ĉinio devis pagi al Britio 6 milionojn da arĝentaj dolaroj kiel kompenso por la konfisko de brita opio, 12 milionojn por ĝia milita elspezo kaj 3 milionojn “pro ŝuldoj al Britio” de iuj komercistoj. Tiuj 21 milionoj da arĝentaj dolaroj (escepte de la 6 milionoj kiel reaĉeta prezo por Kantono) estis grandega sumo eltordita de la britoj el la ĉina popolo.

3) La malfermo de la kvin havenoj. Antaŭe, Kantono estis la sola haveno destinita de King-registaro por fremda komerco. La agresema brita burĝaro persiste postulis malfermi pli da ĉinaj havenoj. En 1832, Britio sendis spionan ŝipon, la *Lord Amherst*, por rekognoski ĉinan marbordon, kolektante politikan, ekonomian kaj militan informojn rilate al Hiamen, Fuĝoŭ, Ningbo kaj Ŝanhajo, kun aparta atento al ĝiaj akvoj. La kvar havenoj ja estis tiuj, kiuj estis malfermitaj unuafoje sub la Nankina Traktato; la fakto elmontris, ke la britaj invadantoj estis longe kun tiu celo. Kantono origine estis komerca elirejo, Ŝanhajo estis la pordo de Jangzi-valo, kaj la aliaj tri havenoj kontrolis elirejojn al la maro en Fugian- kaj Ĝegiang-provincoj.

La malfermo de tiuj kvin havenoj efektive malfermis la pordojn de ĉiuj sudorientaj marbordaj provincoj de Ĉinio. Kun la efektivigo de la kontrakto en doganaj tarifoj, komercaĵoj el kapitalismaj landoj enfluis, grade subfosante ĉinajn originajn ekonomiajn fundamentojn kaj igante ĝian ekonomion iri sur duonkolonian vojon. La Nankina Traktato permesis britajn komercistojn loĝi en la kvin havenoj kun siaj familianoj, kaj la Humen-a Traktato permesis ilin lui teron kaj konstrui domojn por loĝi tie konstante. Poste la fremdaj invadantoj intence tordis la signifon de la rilataj traktataj kondiĉoj, profitante ĉiujn eblajn okazojn por limigi areojn en la komercaj havenoj kaj metante ilin sub sian rektan administradon. Tiuj estis la tiel nomataj “koncesioj”, kie ili efikigis kolonian sistemon de regado, tute sendependan de ĉinaj propraj administrado kaj laŭleĝa sistemo. Ili ankaŭ uzis la “koncesiojn” kiel bazojn por fortigi sian superregadon de ĉinaj politiko kaj ekonomio.

4) Tarifa kontrakto. Laŭ la Nankina Traktato, “modera kaj regula tarifo de eksporta kaj importa doganoj kaj aliaj impostoj” de britaj varoj estis fiksitaj de reciproka interkonsento. Tio signifis, ke Ĉinio ne havis rajton decidi siajn proprajn tarifojn — ili devis esti konsentitaj de la britoj. Kaj, ĉar sub la “Ĝenerala Regularo por Komercio kun Bri-

tio ĉe la Kvin Havenoj", la tarifo de la plejparto de la gravaj varoj estis fiksita je 5 procentoj laŭvalore, la dogana tarifo esence fariĝis fiksita je tiu procento. Tiamaniere, Ĉinio plene perdis tarifan aŭtonomion kaj la ĉinaj doganoj ne povis protekti hejmajn industrian kaj agrikulturan produkton. Fremduloj povis vendi grandkvante da komercaĵoj, turnante Ĉinion en merkaton por siaj industriaj produktoj, dume, igante ĝian agrikulturon servi iliajn proprajn bezonojn. Centjare, imperiismo, kiel grego da malsataj lupoj, tra superregado de la ĉinaj doganoj, kruele ekspluatis la ĉinan popolon.

5) Konsula jurisdikcio. Artikolo 13 de la Ĝenerala Regularo por Komercio kun Britio ĉe la Kvin Havenoj, koncernante disputojn inter Ĉinio kaj Britio, kondiĉis, ke rilate al puno de britaj krimuloj, la brita registaro dekretis la necesajn leĝojn kaj la brita konsulo koncernanta havis rajton efikigi ilin. Alivorte, kiam brito faris krimon en Ĉinio, ĉinaj oficistoj ne havis rajton puni lin laŭ ĉina leĝo; li devis esti traktata de brita konsulo laŭ brita leĝo. Tio estis serioza malobservo de ĉina juĝa povo. Uzante tiujn privilegiojn en Ĉinio, imperiismo faraciis sennombrajn maljustaĵojn kontraŭ la ĉina popolo en la lastaj cent jaroj.

6) Unuflankeca traktado de la plej favorata nacio. En majo 1841, Palmerston, en siaj instrukcioj

al Pottinger, precize menciis akiri la privilegion de unuflankeca traktado de la plej favorata nacio en Ĉinio. La Humen-a Traktato kondiĉis, ke Ĉinio “donos pluajn privilegiojn aŭ imunecojn al aliaj fremdaj civitanoj, la samaj privilegioj kaj imunecoj estos donitaj al kaj ĝuitaj de britaj civitanoj.” Tio estis speciale serioza subfosado de ĉina suvereneco. Similaj kondiĉoj estis enhavitaj en postaj ĉina-amerika kaj ĉina-franca traktatoj. Tiel, se iu ajn alia lando akiris novajn rajtojn kaj privilegiojn de Ĉinio, Britio estis rajtigita al ili, kaj inverse. La diversaj fremdaj potencoj fariĝis kunuloj en la agreso kontraŭ Ĉinio.

La supre diritaj estas la ĉefaj enhavoj de la Nankina Traktato kaj la suplementaj traktatoj. Tie ne estis eĉ unu vorto pri opio kiel la rekta kaŭzo de la milito. En sia taglibro, iu brita imperiisto tiutempe skribis, ke ĉe festeno farita de Kijing por Pottinger en la 26-a de aŭgusto 1842, t.e., tri tagojn antaŭ la subskribo de la traktato, Pottinger konsilis al King-registaro legitimi la opian komercon, dirante loge al Kijing, ke se opio estis libere importata kaj malkaŝe impostata, do kontrabando reduktiĝis kaj enspezo pliiĝis — duobla gajno. Anstataŭ refuti tiun ĉi sensencaĵon, Kijing kaj liaj kolegoj opiniis ĝin racia. Antaŭ subskribo de la Humen-a Traktato, Pottinger sendis John Robert Morrison al la King-aj

oficistoj por postuli la forigon de la opia malpermeso kun noto kiel liaj kaŭzoj: ke Ĉinio antaŭe malpermesis la opian komercon, sed tiu daŭris ĉe maro inter ĉinaj kaj britaj komercistoj, tiel ke la malpermeso estis nur nominala, kaj estis pli bone legitimi la komercon kaj pliigi enspezon de Ĉinio. La King-aj oficistoj argumentis, ke ne estis necese kondiĉi en la traktato la legitimadon de la opia komerco; fakte ili jam certigis Pottinger, ke Ĉinio ne traserĉu aŭ agu kontraŭ iu ajn fremda komercŝipo, ĉu ĝi portis opion aŭ ne. Kun tiu kompreno inter la britaj agresantoj kaj King-registaro, la opia komerco plie prosperis ol antaŭ la milito. Karl Marks montris en 1858, ke opia kontrabando ekspanŝiis pli, sed ne malpli post **“la unua angla-ĉina milito, la rezultoj de kiu aperigis ĉinan ribelon, la absolutan malplenon de la imperia fisko, la sukcesan entrudon de Rusio de la nordo, kaj la gigantajn pliigojn de la opia komerco en la sudo.”***

La Nankina Traktato estis la unua neegala traktato, altrudita de la britaj imperiistoj al Ĉinio, kaj la unua el la katenoj, kiujn la fremdaj invadantoj surmetis sur la ĉinan popolon. Ĝi markis la komencon de la difekto de la ĉina suvereneco, la perfortan malfermon de ĝiaj merkatoj kaj ĝian transŝanĝon de

* Karl Marks, “La Opia Komerco”, septembro 1858.

sendependa feŭda socio al duonkolonia kaj duonfeŭda socio. Ekde tiam, imperiismo kaj feŭdismo komplotis, pliigante sian sklavigadon kaj ekspluatadon de la ĉina popolo, dum la granda ĉina popolo faradis bravan longtempan batalon kontraŭ siaj enlandaj kaj fremdaj malamikoj.

Brita agreso kontraŭ Ĉinio malfermis la vojon por la burĝaro de aliaj landoj, inter kiuj estis Usono kaj Francio, en ĉantaĝo de Ĉinio.

Antaŭ la Opia Milito, Usono venis la dua post Britio en komerco kun Ĉinio kaj en la kvanto de opio de ĝi kontrabandita en Ĉinio, sed estis pli ruza en la rimedoj. La amerika burĝaro komplete akordiĝis kun la britoj pri malfermo de la ĉina pordo kaj ekspluato de la ĉina popolo, kaj ili agis kiel kunkrimuloj de la britoj tra la tuta Opia Milito.

En 1838, usonaj opiaj kontrabandistoj kunligiĝis kun la britoj por subfosi ĉinan ĵus komenciĝintan kontraŭopian movadon. Kiam la britoj estis preparantaj provoki agresan militon en 1839, usonaj komercistoj en Kantono sendis kunan leteron al Kongreso en Vaŝingtono en majo de tiu jaro, petante

la registaron ekagi kaj kuniĝi kun Britio, Francio kaj Nederlando por devigi King-registaron akcepti ilian postulon, ke fremduloj estu permesataj libere komerci en ĉiuj ĉinaj havenoj.

Tiu letero atingis Kongreson en januaro 1840 kaj altiris registaran atenton, sed la usona burĝaro ne deziris rekte partopreni en la brita milito, kredante, ke fiŝi en malklara akvo estas pli avantaĝe por ili. Tial, dum la Opia Milito, la usona registaro sendis sian Orientan Hindan Ŝiparon sub komando de Lawrence Kearny al Ĉinio por subteni la britan armeon. La usona eksprezidanto John Quincy Adams en parolado en 1841 defendis la britojn en ilia agresa milito, dirante, ke ili estis tute pravaj en deklaro de milito. J. L. Nevius, amerika kleriko, longe aganta en Ĉinio, fideklamis, ke justa aŭ maljusta, la Opia Milito malfermis laŭ dia volo novan epokon en la interrilato de Usono kun la vasta King-imperio. Usono koluziis kun Britio en konspiro, direktante agresan lancon al Ĉinio.

Post la subskribo de la Nankina Traktato, la amerika burĝaro envieme vidis, kiom da privilegioj eltordis Britio el Ĉinio, kaj decidis ĉantaĝi King-registaron, profitante ĝian postmilitan malfortecon.

En decembro 1842, la usona prezidanto Tyler proponis en mesaĝo al Kongreso la ekspedon de komisiisto al Ĉinio por preni ŝarĝon de diplomatia

kaj komerca aferoj. Kongreso tuj konsentis kaj investis 40,000 dolarojn por agresaj aktivecoj kontraŭ Ĉinio. En majo 1843, la usona registaro sendis Caleb Cushing, membron de la Komitato de Fremdaj Aferoj, kiel komisaron kaj eksterordinaran delegiton kaj plenpovulon de Usono al Ĉinio, kun F. Webster, filo de la Ŝtata Sekretario de Usono Daniel Webster, kiel lia sekretario. Ili ekiris al Ĉinio kun tri militŝipoj en julio 1843. En sia instrukcio al Cushing, la usona registaro diris, ke Usono devas akiri la samajn komercajn kondiĉojn, kiujn Britio akiris en ĉinaj nove malfermitaj havenoj, alie ĝi ne povas vivi en paco kun Ĉinio.

Cushing atingis Aŭmen kun siaj militŝipoj en februaro 1844. Li unue postulis de King-registaro, ke li estu permesita nun veni al Pekino por aŭdienco ĉe la imperiestro. Poste li deklaris, ke li intertraktis kun neniuj alia oficisto ol imperia komisaro kaj ne rekonis Ĉeng Jucaj, generalgubernatoron de Guangdong kaj Guanghi, kiel sian kontraŭulon en intertraktado. King-registaro tiam ne volis subskribi kun Usono neegalan traktaton kiel la Nankinan Traktaton, kaj Ĉeng multfoje ĝentile rifuzis arbitrajn postulojn de Cushing. Sekve, Cushing sin turnis al minaco de milito. En letero al Ĉeng en la 24-a de aprilo, li malkaŝis sian veran vizaĝon, bruaĉante, ke daŭra rifuzo al liaj postuloj estos rigardata kiel mal-

amika ago kontraŭ Usono. En la 9-a de majo, li skribis minace al Ĉeng, ke ne nur estis amerika ŝiparo survoje al Ĉinio ĉirkaŭ la Kabo de Bona Espero, sed la pafŝipetoj de la Usona Pacifika Ŝiparo estis ankaŭ ordonitaj veni al Ĉinio.

Ne povante elteni minacon de Cushing, King-registaro sendis imperian komisaron, la naciperfidulon Kijing, al Guangdong por intertrakti kun li. Li atingis Vanghia, vilaĝon apud Aŭmen, en la 17-a de junio. Dum la intertraktado Cushing postulis, ke Kijing akceptu la traktaton de li redaktitan kiel kondiĉon de lia neiro al Pekino. En la 3-a de julio, Kijing konsentis, kaj la Vanghia-a Traktato, la unua neegala traktato de usona agreso kontraŭ Ĉinio, estis subskribita.

Laŭ la Vanghia-a Traktato, la usonaj agresantoj ruze akiris, en la nomo de "egala oportuneco", la privilegiojn, kiujn Britio akiris laŭ la Nankina Traktato kaj ĝiaj suplementaj traktatoj, krome iujn ekstraajn privilegiojn, kiuj estis ne klare formulitaj en tiuj dokumentoj.

1) Speciala kondiĉo pri konsula jurisdikcio. Laŭ la Vanghia-a Traktato, en la okazo de disputo inter usona civitano kaj ĉino, la antaŭa devas esti juĝata de amerika konsulo; en iun ajn procesadon inter usonaj civitanoj kaj fremduloj en Ĉinio, ĉinaj

oficistoj ne povas entrudiĝi. Tiel, juĝa povo de Ĉinio estis plue difektita.

2) La kondiĉo pri malobservo de ĉina tarifa aŭtonomio. En rilato al dogana tarifo, la Nankina Traktato nur kondiĉis, ke “modera kaj regula tarifo de eksporta kaj importa doganoj kaj aliaj impostoj” estu fiksitaj de reciproka interkonsento. La Vanghia-a Traktato plue kondiĉis: “Se la ĉina registaro deziras modifi la diritan tarifon, tiaj modifoj devas esti faritaj nur en konsulto kun konsuloj aŭ aliaj oficistoj de Usono kaj en ilia konsento.” Tiamaniere la usonaj agresantoj entrudiĝis en ĉinan tarifan aŭtonomion en pli granda grado.

3) Kondiĉoj pri atenco de ĉinaj teritoriaj akvoj. Artikolo 14 de la Ĉina-Brita Ĝenerala Regularo de Komerco kaj artikolo 10 de la Humen-a Traktato difinis malbonan precedencon, per kiu britaj kroziŝipoj povis ankriĝi ĉe ĉinaj komercaj havenoj. Artikolo 32 de la Vanghia-a Traktato kondiĉis, ke “kiam ajn usonaj militŝipoj, en krozado por la protekto de la komerco, atingis ĉiun ajn de la ĉinaj havenoj”, ili devis esti akceptataj kaj komplezataj de la lokaj ĉinaj aŭtoritatuloj. Artikolo 26 kondiĉis: “Usonaj komercŝipoj en la akvoj de la kvin havenoj de Ĉinio malfermitaj por fremda komerco estos sub la jurisdikcio de la oficiroj de sia propra registaro. . . . ekster kontrolo de Ĉinio.” Tiel, fremdaj ŝipoj povis

eniri aŭ forlasi ĉinajn teritoriajn akvojn senbride, tio serioze difektis ĉinan suverenecon sur la maro.

Plue, laŭ artikolo 17 de la Vanghia-a Traktato, la amerikanoj estis permesataj konstrui siajn proprajn preĝejojn ĉe la kvin havenoj. Tio preparis la bazon por la franca postulo, ke King-registaro nuligu la interdikton de la katolika religio. La lasta artikolo kondiĉis traktatan revizion post 12 jaroj, lasante vojon malfermita por estonta ĉantaĝo fare de la imperiismaj potencoj.

La Vanghia-a Traktato estis neegala traktato kun pli severaj kondiĉoj ol tiuj de la Nankina Traktato; ĝi baldaŭ fariĝis la modelo por la Ĉina-Franca Traktato de Huangpu kaj la traktatoj subskribitaj de Ĉinio kun aliaj landoj. Post la subskribo de la Vanghia-a Traktato, Cushing memkontente skribis al la Ŝtata Departemento de Usono, ke Usono kaj aliaj landoj devis danki Brition pro subskribo de la Nankina Traktato, kiu malfermis ĉinan pordon, sed nun Britio kaj aliaj landoj ankaŭ devis danki Usonon pro malfermo de tiu pordo pli larĝa. Tiamaniere, li konfesis, ke Usono kaptis fiŝon en malklara akvo, sek-vante britajn paŝojn.

Ankaŭ Francio postvenis ĉe la kalkanoj de Usono.

Antaŭ la Opia Milito, komerco de Francio kun Ĉinio estis multe malfrua ol tiu de Britio kaj Usono.

Kiam la milito eksplodis, la franca burĝaro zorge observis ĝian progreson, esperante profiti de ĝi. En la komenco de 1841, la franca registaro sendis Colonel A. P. Dubois de Jancigny al Ĉinio por esplori la situacion en la Ekstrema Oriento kaj efektivigi malamikajn aktivecojn. Kiam la britoj perforte invadis Jangzi-valon, du francaj militŝipoj, la *Erigone* kaj la *Favorite*, ankriĝis ĉe Vusong, pafante per salvoj por saluti la invadantan ŝiparon, kaj entrudiĝis en Jangzi, malrespektante ĉinan suverenecon. Ĉe la subskribo de la Nankina Traktato, kapitano Cécille de la *Erigone* suriris sur militŝipon *Cornwallis* kiel neinvitita gasto por ĉeesti ceremonion.

Uzante la subskribon de Nankina Traktato kiel ŝancon por ĉantaĝi Ĉinion, la franca registaro sendis Théodose M.M.J. de Lagrené al Ĉinio kiel plenpovulon kun ok militŝipoj.

Lagrené estis konata kiel ruza politikisto. Kiam li venis al Aŭmen en aŭgusto 1844, li ne malkaŝis sian veran intencon antaŭ la formala intertraktado, tiel ke la imperia komisaro de King-registaro Kijing estis devigita sendi oficistojn al Aŭmen por trovi ĝin. Lagrené intence disvastigis diversajn famojn: ke li deziris amikiĝi kun Ĉinio kaj helpi ĝin rezisti kontraŭ la britoj; ke li deziris okupi Humen por ĉagreni Ĉinion; ke li estis postulanta fini la interdikton de la katolika religio; aŭ ke li volis iri al Pekino

por ricevi aŭdiencon ĉe la imperiestro. Tiuj konfuzaj diroj perpleksigis Kijing, kiu estis puŝita en pasivan pozicion, maltrankvile atendente, kio okazos. Ĉe la komenco de oktobro, kiam formala intertraktado komenciĝis, Lagrené zorge studis la ĉina-britan kaj ĉina-usonan traktatojn kaj bone sciis la staton de King-registaro. Kiam li petis efektivigi komercan traktaton laŭ la precedencoj de Britio kaj Usono, Kijing rapide konsentis. En la 24-a de oktobro, la Ĉina-Franca Traktato de Huangpu estis subskribita sur la franca militŝipo ĉe Huangpu.

Laŭ tiu traktato Francio facile akiris la grandajn privilegiojn, kiujn Britio kaj Usono jam akiris, kiel komercon ĉe la kvin havenoj, konsenton pri tarifo, konsulan jurisdikcion kaj la unuflankecan traktadon de la plej favorata nacio, kaj ankaŭ iujn novajn privilegiojn. Distingiĝa en la Huangpu-a Traktato estas tio, ke krom doni al Francio la rajton konstrui preĝejojn kaj tombejojn en la kvin havenoj, ĝi kondiĉis, ke la lokaj King-oficistoj severe punu ĉiujn pekulojn en tiuj lokoj. Tiu kondiĉo donis al King-registaro la respondecon por protekti francajn preĝejojn kaj klerikojn kaj portis ekstreman malutilon al la ĉina popolo. Sub ĝia protekto, la imperiistoj malkaŝe efektivigis agresajn aktivecojn, utiligante la mantelon de religio.

La apetito de la invadantoj estis senlima. Ne kontentigite je la specialaj privilegioj ceditaj en la traktatoj, Lagrené uzis la problemon pri la interdikto de la katolika religio kiel pretekston por plue eltordi King-registaron.

La katolika religio longe estis grava ilo por Francio en ĝia agreso al fremda politiko. La du francaj katolikaj klerikoj, Jean-Francois Gerbillon kaj Joachim Bouvet, bone konataj inter ĉinaj konvertitoj, estis senditaj de King Louis XIV al Ĉinio en la Kanghi-a periodo (1662 — 1722). Tamen, la religia interdikto, proklamita de King-registaro en la komenco de 1724, sub kiu la praktiko de la katolika kredo de ĉinoj kaj ĝia propagando de fremdaj klerikoj estis malpermesitaj, estis serioza frapo por tiu politiko. Por nuligi la interdikton, Francio sendis klerikojn antaŭ la Opia Milito al Aŭmen por longtempe studi la ĉinan lingvon kaj ĉinan staton. Katolikaj klerikoj, sin alivestinte en ĉinojn, venis en la internon de Ĉinio, serĉante vojon por devigi King-registaron nuligi la interdikton. La franca registaro rigardis la subskribon de la Nankina Traktato kiel ŝancon por fari premon sur King-registaron, kaj tio ja estis unu el pli gravaj celoj de Lagrené en tiu misio al Ĉinio. Kiam li atingis Aŭmen, li sugestis Kijing pere de la tie loĝanta franca kleriko Callery, ke

li povis cedi aliajn postulojn, sed insistis pri la nuligo de la interdikto.

Kvankam laŭ la Huangpu-a Traktato estis donita al la francoj la privilegio konstrui preĝejojn en la kvin havenoj, tamen la francoj ankoraŭ havus malfacilon por uzi ĝin en sia agresa politiko, se King-registaro ne nuligus la interdikton. Tial, Lagrené decidis insiste peti pri tiu postulo aldone al tiuj gajnitaj en la traktato. Subpremite, la imperiestro Daŭguang finfine aprobis la nuligon de la interdikto en la 11-a de novembro 1844, tio estas, 17 tagojn post la subskribo de la Huangpu-a Traktato.

Tamen, la imperiestro ne faris proklamon pri la nuligo, li akceptis la francan postulon nur por pacigi Lagrené. En aŭgusto 1845, Lagrené decidis persekuti sian celadon ĝis la fino, uzante la interŝanĝon de ratifikoj de la Huangpu-a Traktato por postuli proklami la nuligon de la interdikto. Post tio, li venis por rekognoska ekspedicio al Sanhajo, Ningbo kaj Hiamen kaj revenis al Aŭmen en la komenco de decembro. Li pretendis, ke la nuligo de la interdikto ĉie estis nominala, kaj premis King-registaron fari proklamon, dirante, ke alie la aferoj inter la du landoj atingus nekoncepteblajn statojn. Sub tiu minaco, la imperiestro Daŭguang ordonis en februaro 1846 al ĉiuj provincaj oficistoj fini la interdikton. Tiel,

la francoj akiris la plenan kontentigon pri la agresa postulo.

La privilegioj akiritaj de Francio por siaj klerikoj ludis malbonegan rolon en la historio de moderna imperiisma agreso kontraŭ Ĉinio. De tiam, fremdaj klerikoj, akompanante opion, varojn kaj kanonojn, fluis en Ĉinion sen malhelpo. Unuflanke, ili subaĉetis naciperfidulojn, kolektis informon kaj propagandis superstiĉon por paralizi la popolon; aliflanke, ili komplotis kun la King-aj oficistoj, subpremis kaj supertiranis la popolon kaj faris multe da aliaj malbonaj aferoj. Ili estis en la fronto de la imperiisma penetro en Ĉinion, portante katastrofon al la ĉina popolo.

Tiamaniere, post la subskribo de la Nankina Traktato, la usonaj kaj francaj invadantoj, sekvante la britojn, komencis invadon en Ĉinion. Ankaŭ multaj aliaj eŭropaj landoj, kiaj la Portugalio, Belgio, Svedio kaj Norvegio, poste postulis la efektivigon de komercaj traktatoj, kaj la putraj King-regantoj donis egalajn privilegiojn al ĉiuj. Dank' al la Opia Milito, la pordo de Ĉinio ne nur malfermis al Britio, sed ankaŭ al la tuta kapitalisma mondo.

La malvenko de Ĉinio en la Opia Milito kaj la subskribo de la Nankina Traktato portis al Ĉinio grandegan influon, de tiam Ĉinio perdis sian sendependecon, kaj signifa ŝanĝo okazis interne de ĝia socio. Sub la pliiganta fortega frapo de fremda kapitalismo, ĉina memsufiĉa natura ekonomio grade disiĝis, kaj grandnombro da kamparanoj kaj metistoj bankrotis. Krom la kontraŭdiro inter feŭdismo kaj la popolamasoj, la ĉefa kontraŭdiro en ĉina socio, estis nun aldonita la kontraŭdiro inter fremda kapitalismo kaj la ĉina nacio. De tiam, paŝon post paŝo Ĉinio fariĝis duonkolonia kaj duonfeŭda socio. Kaj la kontraŭdiro inter imperiismo kaj la ĉina nacio kaj tiu inter feŭdismo kaj la popolamasoj akriĝis, klasaj interrilatoj kaj klasa batalo en ĉina socio suferis senprecedencan ŝanĝon.

Prezidanto Maŭ montris: “Fremda kapitalismo ludis tre gravan rolon en disigado de la socia ekonomio de Ĉinio, unuflanke, ĝi detruis la bazon de ĝia memsufiĉa natura ekonomio kaj la metian industrion tiel en la urboj kiel en kamparanaj hejmoj, kaj aliflanke, ĝi plirapidigis la disvolviĝon de var-ekonomio en la urboj kaj en la kamparo.”* La rolo de fremda kapitalismo en la disigo de ĉina socia ekonomio fariĝis ja evidenta en la daŭro de kelkaj jaroj post la Opia Milito. Ĉar kapitalismaj komercaĵoj, precipe fremda kotona ŝtofo kaj fadeno, inundis la ĉinan merkaton, la metia teksa industrio en areoj apud la kvin komercaj havenoj — Kantono, Hiamen, Fuĝoŭ, Ningbo kaj Ŝanhajo, suferis la unua. En Songgiang, Tajcang kaj aliaj lokoj apud Ŝanhajo, kaj ankaŭ en Kantono kaj Hiamen, ĝi komencis dekadenci en la mezo de la kvardekaj jaroj. La dekadenco de la metia industrio, estanta la grava kampara flank-okupo kaj grava kompono de ĉina memsufiĉa natura ekonomio, markis la komencon de la disigo de ĉina socia ekonomio.

Samtempe, tamen, fremda kapitalismo plirapidigis la disvolviĝon de var-ekonomio en la urboj kaj en la kamparo, kiel montris la abrupta kresko de la eksporto de silko kaj teo. En 1851, preskaŭ 100 mi-

* “La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio”, *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, Vol. II, p. 299.

lions da funtoj da teo estis eksportitaj, duoble pli ol tiu antaŭ la Opia Milito. En la fino de la kvardekaj jaroj, la eksporto de silko pliiĝis de la antaŭmilita nivelo de 12,000 pakoj ĝis pli ol 20,000. Tiu granda eksporto stimulis la produkton de tiuj du objektoj. Silkovolva industrio en Giangsu kaj Ĝegiang kaj tea kultivado en Hunan rapide disvolviĝis. Fabrikoj estis starigitaj en Ŝanhajo por prilabori teon por eksporto. Ĉe tiu tempo la eksporta komerco en silko kaj teo estis preskaŭ tute superregita de fremduloj, ĉefe de la britoj, kiuj decidis la kvanton kaj prezon de la eksportoj. Tio atestis, ke Ĉinio ekfariĝis parto de la kapitalisma monda merkato.

Opia kontrabando daŭre estis grava rimedo, per kiu la fremdaj invadantoj prirabis la ĉinan popolon. Meznombra jara importo de opio pliiĝis de 37,000 kestoj en la kvardekaj jaroj ĝis 70,000 en la kvindekaj jaroj. En la dekelkaj jaroj post la Opia Milito, ĉirkaŭ 700,000 — 800,000 kestoj da opio valoranta 300 — 400 milionojn da arĝentaj dolaroj estis importitaj. Hongkongo fariĝis la opia kontrabanda centro; Ŝanhajo kaj Kantono servis kiel la plej grandaj opiaj importaj havenoj. La ciferoj en 1848 montris, ke estis 35 surterigaj ŝipoj, la tiel nomataj “fluantaj fortikaĵoj”, por transporti opion en Ĉinion, kaj estis 22 antaŭ la Opia Milito. El tiuj 12 estis ĉe Vusong de Ŝanhajo. En 1849, la opio sur la surterigaj ŝipoj

ĉe Vusong superis 22,900 kestojn. La konstanta ĉerpado de arĝento por pagi importitan opion kaŭzis valorfalon de la kupra mono kaj valoraltiĝon de arĝento — la malnova problemo fariĝis multe pli serioza post la Opia Milito. En 1845, la kurzo estis tiel alta, ke oni devis pagi 2,000 kuprajn monerojn por unu *liang*-o da arĝento. Tiam, la jara salajro de 10,000 moneroj por dungita laboristo valoris nur kvin *liang*-ojn. La disvastigita uzo de opio portis pli grandan katastrofon al la popolo.

Post la malfermo de la kvin komercaj havenoj, la fremdaj invadantoj starigis komercajn firmojn tie por komerci kaj ekspansiigi sian potencon. El la kvin havenoj Ŝanhajo disvolviĝis plej rapide. Intence tordante la signifon de la traktataj kondiĉoj, en 1845 la britoj la unuaj devigis lokajn King-oficistojn limigi areon laŭlonge de Huangpu-rivero kiel la “Britan Koncesion”. En 1848, la usonaj invadantoj kaptis parton de Ŝanhajo kiel loĝejan distrikton por amerikanoj. Poste ĝi unuiĝis kun la Brita Koncesio por formi la “Internacian Kolonieton”. En 1849, ankaŭ la francoj okupis distrikton inter la norda loko de la Ŝanhaj-gubernia sidejo kaj la Brita Koncesio kaj faris ĝin la “Franca Koncesio”. La fremdaj invadantoj uzis ĉiun ŝancon por preni administran, juĝan kaj polican povojn en la koncesioj, turnante ilin en “ŝtatojn interne de ŝtato”. Post la okupo de

Hongkongo, la britoj penis disvolvi ĝin en gravan bazon por agresi Ĉinion. En 1849, ankaŭ la portugalaj koloniistoj elpelis la ĉinajn oficistojn el Aŭmen, rifuzis pagi terrenton kaj perforte okupis tiun marbordan havenon. Tiel, nombro da urboj koloniaj kaj duonkoloniaj aperis laŭlonge de la sudorienta marbordo de Ĉinio.

En tiuj urboj eliĝis la komprador-komercistoj. Iuj estis senpere dungitaj de fremdaj firmoj, dum aliaj starigis komercajn firmojn aŭ staplojn por vendi importitajn komercaĵojn kaj aĉeti eksportaĵojn por fremduloj, ekskluzive servante al kapitalisma ekonomia agreso. Tamen, ilia nombro ankoraŭ ne estis sufiĉa por formi socian forton, sed iliaj aktivecoj helpis la fremdulojn ekspansiigi sian importan kaj eksportan komercon, per kiu tiuj komprador-komercistoj prenis grasajn profitojn kaj fariĝis riĉaj. Tiamaniere, en la historio de moderna Ĉinio la kompradora burĝaro montris sin klaso, kiu senpere servis al kaj estis nutrita de la kapitalistoj de imperiismaj landoj.

Kun subfosado de fremda kapitalismo al ĉina socia ekonomio, la kontraŭdiro inter la fortoj de agreso kaj la ĉina popolo pliprofundigis. La kvin komercaj havenoj fariĝis la bazoj por kapitalisma agreso kontraŭ Ĉinio. Fremdaj militŝipoj ofte veturis tien aŭ foren, aŭ ankriĝis ĉe ili. Fremdaj ban-

ditoj kaj aventuruloj kolektiĝis en tiuj lokoj, kie rabo, mortigo kaj multaj aliaj krimoj estis oftaj. Plej malbona estis la negoco en kontraktitaj laboristoj. En Ŝanhajo, Hiamen, Ŝantoŭ, Nan'aŭ, Kantono kaj Aŭmen, britaj, usonaj, francaj, hispanaj kaj portugalaj banditoj uzis trompon aŭ minacon por kapti aŭ ŝtele aresti ĉinajn laborantojn (la tiel nomataj "kulioj") kaj perŝipigis ilin al Norda kaj Suda Ameriko, la Okcidenta Hindio, Afriko kaj aliaj lokoj por ilin peze laborigi. La fremdaj komercistoj varbis lokajn friponojn tra la tuta lando kiel siajn agentojn por posedi pli kaj pli da ĉinaj laboristoj kaj ilin vendi. La brita konsulo, Sir Rutherford Alcock, diris en raporto, ke en Kantono "neniu povis forlasi sian propran domon, eĉ sur grandaj stratoj kaj en luma tago, sen danĝero esti haltigita, sub falsa preteksto de ŝuldo aŭ kulpo, kaj forportita kiel kaptito, por esti vendita al la provizistoj de kulioj por kiom po kapo, kaj forportita al maro, neniam plu priaŭdita; la tuta loĝantaro de la urbo kaj apudaj distriktoj sentis komunan danĝeron." En Ŝanhajo, eĉ iuj laborantoj, kiuj venis en la fremdajn koncesiojn por vendi agrikulturan produktaĵon, estis kaptitaj de britaj komercistoj.

La ŝipoj, transportantaj la ŝtele arestitajn ĉinajn laborantojn el Ĉinio kaj nomataj "flosantaj inferoj", estis plene armitaj. La laborantoj estis dense enfer-

mitaj en malbone aerumitaj kajutoj. Pro tiu ĉi kaj aliaj formoj de nehoma traktado, morta grado survoje eĉ atingis 45 procentojn. Ankaŭ multaj mortis de torturo post alveno al cellokoj. La postvivantoj faris devigan laboron kaj estis senkompate kaj sklave ekspluatataj.

La ŝtele arestitaj ĉinaj laborantoj rifuzis cedi kaj ribelis dum preskaŭ ĉiu vojaĝo. En 1852, ekzemple, pli ol 400 "kulioj", portataj de Hiamen al San-Francisko sur amerika ŝipo, la *Robert Brown*, ribelis. Ili mortigis la kapitanon kaj devigis la ŝipon reveni al Hiamen. Kiam la ribelo estis kruele subpremita, ili faris firman reziston, preferante droni en maro kun la ŝipo ol cedi. Tiu ĉi okazaĵo montris la heroan spiriton de la ĉina popolo.

La sociaj ŝanĝoj, kaŭzita de la agreso de la okcidenta burĝaro, kaj la katastrofoj, portitaj de ĝi al la ĉina popolo en la dekelkaj jaroj post la Opia Milito, montris, kian minacan influon donis la milito al Ĉinio.

Prenante okazon de la privilegioj gajnitaj laŭ la neegalaj traktatoj, la imperiismaj potencoj, precipe la brita, senkompate etendis sian ekonomian rabon, tiranis kaj sklavigis la ĉinan popolon. Tio ne povis ne pliprofundigi la kontraŭdiron inter la fremdaj agresantoj kaj la ĉina popolo kaj klare montriĝis en la postaj bataloj de la popolo kontraŭ la invadantoj

en la kvin havenoj, kaj en Hongkongo kaj Aŭmen. La plej longa kaj granda el tiuj okazis en Kantono, kie la popolo suferis plej multe de la milito.

Post la fama popola batalo kontraŭ la britoj okazinta en la Sanjuanli-a areo, la urbaj kaj antaŭurbaj popolanoj de Kantono starigis “eduksocietojn” por subteni nacian honoron kaj sin protekti. Tiuj efektive estis armitaj organizoj de amasoj en rezistado kontraŭ agreso.

Ordinare, “eduksocieto” estis loka lernejo establita por feŭda edukado en kamparo. Poste ĝi iom post iom fariĝis la loko, kie la biensinjoroj formis lokan milicion. Post la eksplodo de la Opia Milito kaj la atako al Kantono fare de la britoj, precipe post la kontraŭbrita batalo de la Sanjuanli-a popolo, la “eduksocietoj” kun nova enhavo de batalo kreskis ĉirkaŭ Kantono.

El tiuj la plej frue starigita estis Sengping-eduksocieto en la Sanjuanli-a areo. Poste similaj organizoj aperis en la urbo Kantono kaj la najbaraj distriktoj. Sengping-eduksocieto estis la unua armita organizo de rezista forto, kaj ĝi fariĝis la fokuso de tiuj aktivecoj dank’ al sia sufiĉa forto. Kamparanoj, metiistoj kaj komizoj estis la bazaj amasoj, kaj iuj patriotaj biensinjoroj helpis organizi tiujn eduksocietojn. Tra tiu formo de organizo, la amasoj, kiuj partoprenis en disigitaj, spontaneaj kontraŭagresaj bataloj,

fariĝis fortega kolektiva forto. La membroj de eduk-societoj superis maksimume 100,000.

La grandinflua eduksocieto gvidis multajn batalojn kontraŭ la britaj agresantoj. Ĉe la fino de 1842, kiam iu brita maristo eskapis en fremdan faktorian ekster Kantono post krimfarado, dekmiloj da popolanoj ĉirkaŭis la konstruaĵon kaj bruligis ĝin. En 1844, kiam la britoj provis limigi la Henan-an distrikton sude de la Kantona Rivero en Kantono kiel "koncesion", la tieaj popolanoj leviĝis al rezisto. Pli ol 3,000 manifestaciantoj venis al la fremda faktoria areo por protesti. La britoj estis devigitaj cedi portempe.

La batalo kontraŭ la eniro de fremduloj en la urbon estis la plej granda batalo farita de la popolo de Kantono post la establo de la eduksocieto. Fremdaj komercistoj venantaj al Ĉinio por komerci ĉiam loĝis en la fremdaj faktorioj ekster Kantono. La Nankina Traktato ne donis permeson al la britoj eniri en la urbon, sed ili intence distordis ĝin kaj insistis pri la rajto de eniro. En januaro 1846, subpremite de la brita plenpovulo, Sir John Davis, Kijing, generalgubernatoro de Guangdong kaj Guanghi, faris proklamon, permesante al la britoj eniri en la urbon. Tio tuj incitis la indignon de la popolo, kiu ŝiris la proklamon kaj surgluis multe da afiŝoj, avertante la oficistojn, ke se ili permesos al la invadantoj eniri

en la urbon, "la justa popolo kaptos tiujn oficistojn kaj mortigos ilin!" Miloĵ da popolanoj amasiĝis en la oficejon de Liu Hĵun, estro de Kantono, sed li forkuris trans muron. La indignaj popolanoj bruligis liajn oficialajn robojn, ĉapelon kaj botojn. La eduksocieto aperigis anoncon, vokante ilin al la atako kontraŭ la fremdaj faktorioj en certa dato. Davis forkuris al Hongkongo. Tiel, la politiko de King-registaro subpremi la popolon por pacigi la fremdulojn suferis severan frapon.

En 1847 la britoj faris alian provon eniri en la urbon Kantonon per minaco de armita forto. En aprilo, Davis direktis britajn militŝipojn kun pli ol 1,000 soldatoj por entrudiĝi tra Humen en internajn riverojn kaj denove postulis de Kijing la rajton pri libera eniro. Dezirante kaŝi sian kapitulacon antaŭ la popolo, Kijing sekrete konsentis ilian eniron en la dua venonta jaro. Tamen, la popolo ne malstreĉis sian atenton. En 1849, Hĵu Guangĝin, generalgubernatoro de Guangdong kaj Guangĥi post Kijing, ne kuraĝis plenumi la sekretan kontrakton pro altiĝantaj kontraŭbritaj sentoj inter la popolo. Kiam Sir George Bonham, brita generalgubernatoro de Hongkongo, gvidis militŝipojn al Humen por devigi King-registaron efektiviĝi la sekretan kontrakton, la popolo de Kantono firme rezistis la entrudiĝon. En kaj ekster la urbo kaj en la Henan-a distrikto, organi-

ziĝis armita forto kun 100,000 popolanoj. Ili sin ekzercis tage kaj nokte, preparante por batalo, dum la membroj de la eduksocietoj estis atentegaj ĉiutempe. Ankaŭ la komercistoj deklaris bojkoti komercon kun la agresantoj. Hju Guanggin kliniĝis al la volo de la amasoj kaj rifuzis postulon de Bonham, kaj tial la lasta direktis siajn militŝipojn al la Kantona Rivero. La popolanoj de najbaraj lokoj preparis por batalo; pli ol 100,000 batalekriante viciĝis ambaŭborde de la rivero. Timigite, Bonham forlasis sian postulon kaj retiriĝis al Hongkongo. Poste, Hju Guanggin raportis al la imperiestro: "Malhelpi la britojn eniri la urbon ne povas eligi militon, sed maldiskrete konsenti ilian postulon certe naskos tujan militadon." King-registaro ŝajnis konsentanta kun la popolaj deziroj, sed fakte ĝi tiel faris nur por sin savi de la proksimega ŝtormo.

La problemo pri libera eniro en la urbon Kantonon estis intence kreita de la britaj invadantoj. Ili insiste distordis la rilatajn privilegiojn de la Nankina Traktato por atingi sian celon, ke King-registaro devis akcepti ĉiun ajn postulon elmetitan de ili. Ili neniam supozis, ke la ĉina popolo, tute diferenca de la King-aj regantoj, estis tiel fortega kaj povis rifuzi cedi al kontraŭulo. Post sia malsukceso perforte eniri en la urbon en 1849, Bonham skribis en raporto al sia registaro, ke la popolo kaj milicio ĉirkaŭ Kan-

tono firme rezistis al eniro de britoj kaj ke la celo ne povus esti atingita, se ne estus uzita granda forto, ĉar la popola rezisto estis multe fortega ol ĝia unua rezisto en 1841. Tio ĉi estis konfeso, ke la invadantoj prokrastis sian postulon pro timo de la forto de la ĉina popolo.

Dum la daŭro de la kontraŭagresa batalo de la popolo de Guangdong, la kontraŭfeŭda batalo de la kamparanoj disvolviĝis tra la tuta lando, kaj klasaj kontraŭdiroj interne de Ĉinio rapide kreskis ĝis ekstreme akra grado. Tio estis kaŭzita de la katastrofo farita de fremda agreso unuflanke kaj, aliflanke, de la akriĝo de la krizoj de feŭda socio mem. Marks montris en 1853: **“La tributo pagenda al Anglio post la malfeliĉa milito de 1840, la granda neprodukta konsumo de opio, la ĉerpado de la karegaj metaloj pro ĝia komerco, la detrua influo de fremda konkurso al indiĝena fabrikado, la demoralizita stato de la publika administrado, ĉio ĉi tio kaŭzis du rezultojn: la malnova impostado fariĝis pli ŝarĝa kaj turmenta, kaj nova impostado estis aldonita al la malnova.”*** Klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo en ĉina socio pliintensiĝis post la Opia Milito, ĉar nova fremda kapitalisma ekspluato estis aldonita al la malnova kruela feŭda ekspluato.

* Karl Marks, “Revolucio en Ĉinio kaj en Eŭropo”, majo 1853.

Post la milito, King-registaro subpremis la polon ĉiarimede por pagi la militajn elspezojn kaj la kompensojn, sume 70 milionojn da arĝentaj dolaroj. Publika administrado fariĝis pli putra ol ĉiam antaŭe, ĉar troegaj kaj diversegaj impostoj kolektitaj de oficistoj ĉe ĉiu nivelo multiĝis. La despota sinjoraro kaj bienularo kunlaboris kun la aŭtoritatoj por turnisian propran ŝarĝon al la kamparanoj. Sub senkompata politika subpremo kaj peza ekonomia ekspluatado, la popolamasoj finfine leviĝis al ribelo. En la *Dong Hua Lu* (Kronikoj de King-dinastio), jam pli ol 100 leviĝoj estis menciitaj. Ili estis faritaj de la Han-a, huj-a, miaŭ-a, tibeta, ĵi-a, jaŭ-a, ĝuang-a kaj aliaj naciecoj de 1841 ĝis 1849 kaj etendiĝis preskaŭ tra la tuta lando. Multe da sekretaj organizoj, kiel la Nian, la Fu kaj la Dian Di Huj (Ĉiela kaj Tera Societo), fariĝis aktivaj inter la popolo. Ĉio ĉi tio antaŭmontris grandan revolucion leviĝon, skuontan la teron de Ĉinio.



鴉片戰爭
《中國近代史叢書》編寫組

外文出版社出版（北京）

1978年（32開）第一版

編號：（世）11050—105

00065

11—Es—1375P